1982 majo
75-a jaro
n-ro 917 (5)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Budapeŝta teatra festivalo

(En ĉi tiu numero: Estrara Raporto 1981)

Vi trovos,

ke tio ĉi apenaŭ estas revunumero, ĉar la disponeblan spacon preskaŭ komplete konsumis la Raporto de la Estraro pri la agado dum la pasinta jaro. Se la redaktoro devis legi la tutan Raporton minimume trifoje, li ial esperas, ke ankaŭ la plimulto de la legantoj faros tion almenaŭ unufoje. Ĉu ne, ke vi interesiĝas pri la vivo de la Asocio en kiu vi membras? Kvankam eble ne decas, ke la redaktoro tiel rilatu al la teksto de la Estraro, ni tamen diru, ke la Raporto havas plurajn mankojn, ke ĝi foje emfazas aferojn, kiuj tion ne meritas en tia grado, ke ĝi aliokaze forgesas agadojn atentindajn. Jen tial aparta mesaĝo al tiuj du mil el vi, kiuj partoprenos la 67an UK en Antverpeno: Tie oni publike traktos la Raporton en la Unua Ĝenerala Kunsido de UEA. Kial ankaŭ vi ne partoprenu tiun diskuton? Eĉ se vi ne iras al Antverpeno, vi povas komisii iun, kiu vojaĝas tien, diskuti anstataŭ vi. Kial oni ne ŝvitigu la Estraron dum tiu diskuto? Iom da sana kritiko povas influi nur bone. Ĝis tie!

Enhavo

81 Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj: Festo de la Esperanta teatra kulturo (laŭ raporto de V. Benczik)
82 Centjara Jubileo de Esperanto: Konkurso pri jubilea afiŝo
83 Universala Esperanto-Asocio: Raporto de la Estraro de UEA pri la agado dum 1981:
Enkonduko; Ĝeneralaĵoj; Administrado
84 Financo
85 Institucio Hodler '68
86 Revuo "Esperanto"; Kongresoj
87 Informado
88 Eksteraj rilatoj
90 Kulturo kaj edukado
91 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
92 Landa kaj regiona agado
93 Faka agado
94 Esploro kaj dokumentado; Finaj vortoj
95 Financaj aldonaĵoj al la Raporto:
Buĝeto kaj spezokonto por la jaro 1981
96 Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1981
97 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
99 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
100 Anoncetoj

La kovrilo

Se oni scias, ke la teatra arto en la Internacia Lingvo dum la lastaj jaroj spertas ĉiam pli grandan popularecon, tiam ne necesas miri, ke estis eble organizi dek tagojn longan revuon de niaj atingaĵoj sur tiu kampo. Kio ja elvokas iom da miro, tio estas la rolo de la gastiganta lando en la budapeŝta renkontiĝo. Esperanta teatro eble vegetis en Hungario dum la lastaj jardekoj, sed hungaroj dum jaroj ne faris ion atentindan sur la teatra kampo, ne almenaŭ de post la morto de Julio Baghy. Kaj nun subite aperas du profesiaj trupoj kun dekoj da rimarkindaj geaktoroj. Nur Srĝan Flego (Internacia Arta Teatro) kaj Kiril Draĵev (Bulgara Esperanto-Teatro) sciis en la pasinteco engaĝi tiom da profesiuloj kaj levi la Esperantan teatron al la nivelo de profesieco. Ĉio ĉi sonas tute ekscite antaŭ la venontjara 68a Universala Kongreso en Budapeŝto, kiam miloj kaj miloj da esperantistoj povos – espereble – ĝui almenaŭ parton de tio, kio okazis en Budapeŝto fine de marto ĉi-jare. Niaj kovrilaj fotoj (ĉiuj de Jakab Regós) montras scenojn el "La aŭroroj ĉi tie estas silentaj" (supre/maldekstre kaj sube) kaj "Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?".

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono**: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Maandelijks tijdschrift "esperanto", nr. 917 (5), mei 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, België

Festo de la Esperanta teatra kulturo

Inter la 19a kaj 28a de marto ĉi-jare, en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo, okazis en la hungara ĉefurbo tre sukcesa Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Temis pri entute dek du teatraj prezentaĵoj, plenumitaj de plejparte profesiaj aktoroj el kvar landoj: Francio, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio. Kvankam la nombro de la teatraj trupoj fine estis malpli granda, ol la organizantoj esperis, la Renkontiĝo sendube estis la plej granda revuo de la Esperanta teatra arto okazinta dum la lastaj jardekoj. Estas aparte grave emfazi, ke ne temis pri fermita movada aranĝo, sed pri larĝe malfermita publika elmontro de la internacilingva kulturo. Ĉi-sekve ni resumas ampleksan raporton, kiu atingis nin rapide post la dek teatraj tagoj en Budapeŝto.

KONFORME al la rekomendoj, kiujn faris Monda Turisma Konferenco en Manilo en 1980, Hungarlanda Turisma Oficejo iniciatis – kaj financis! – la enkadrigon de Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj en Budapeŝta Printempa Festivalo. Cetere, niaj legantoj memoras, ke ĝuste la hungara delegacio en Manilo havis apartajn meritojn pri la favora aludo al Esperanto en la deklaracio de Manilo. Ĉio ĉi intime ligiĝas al la nomo de s-ro Márton Lengyel, vicestro de Hungarlanda Turisma Oficejo. Sed, kio fakte okazis fine de marto en Budapeŝto, kiel pasis la dek teatraj tagoj?

Unua tago: La inaŭgura tago, la 19a de marto, portis eble la ĉefan kaj la plej elstaran teatraĵon de la Renkontiĝo – *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?*, de János Elem. Kvankam oni ludis Esperantan tradukon de hungarlingva originalo, tio ĉi estis la unua kaj la vera premiero de la verko, ĉar la hungara originalo ankoraŭ ne estis ludita ĝis nun. Cetere, la verko nun aperis ankaŭ libroforme (dulingve: hungare kaj Esperante) ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

Tiu premiera vespero en la Budapeŝta Teatro "Miklós Radnóti" komenciĝis per laŭtlego de salutletero, kiun al la Renkontiĝo sendis s-ro B. Ragnarsson, vicprezidanto kaj estrarano de UEA pri kulturo, kaj malferma saluto de d-ro Imre Pethes, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. La teatraĵo de Elem havas – kvazaŭ simbole por ĉi tiu okazo – temon, kiu rilatas al turismo kaj interkompreniĝo. Ĝi bildigas fikcian turisman vojaĝon al dezerto, kie la vojaĝantoj estas lasitaj dum du semajnoj, kun nutraĵoj kaj tendoj, sed sen ajna programo. "Se plaĉos al vi – diras adiaŭe la ĉiĉerono – proklamu vin reĝoj, boru tunelon tra la dezerto, seksperfortu, eĉ amu unu la alian, buĉu vin mem kaj viajn gekunulojn, kreu novan ŝtatoformon, blasfemu, ignoru la aliajn aŭ provu komprenigi vin al ili. . ." En tia situacio kreiĝas tiel konfliktoj kiel amuzaj scenoj, sed ne mankas ankaŭ provoj levi filozofiajn demandojn, kiel ekzemple: "kion oni faru estante libera?". La rolojn de la turistoj plenumis elstaraj hungaraj geaktoroj, vaste konataj per filmoj kaj televido. En 30-hora intensa kurso ili konatiĝis kun la bazaj gramatiko kaj vortaro de Esperanto, por nur poste eklerni siajn rolojn. Tia procedo multe kontribuis al la kvalito de la sceneja lingvouzo, kiu montriĝis spontana kaj altranga.

Dua tago: Prezentiĝis "La Krizalido", Teatro Internacia de Akvitanio (Francio), kun ges-roj Solen kaj Arno Lagrange en la teatraĵo *Ĉu dio bojas?*, de la franca dramisto Boyer. La publiko tre bone akceptis la aktoran arton de la franca trupo, kiu jam plurfoje prezentiĝis en aliaj landoj al la movada publiko.

Tria tago: Ĝi estis omaĝo al la plej granda hungara kontribuinto al la Esperanta kulturo – Kolomano Kalocsay. Temis pri podia prezento de originalaj kaj tradukaj poemoj de Kalocsay, ĉio plektita kun muzikaj eroj, inter kiuj troviĝis eĉ komponaĵo de Kalocsay mem. Cetere, samtage, en Abaujszántó, naskiĝloko de la granda poeto kaj tradukisto, inaŭguriĝis memortabulo kaj strato kun la nomo de Kalocsay.

Kvara tago: Jadwiga Gibczynska (Pollando) prezentis sian jam faman *Slavaj fabeloj* , de Leŝmian, per kiu ŝi plurfoje ravis la movadan publikon. Novaĵo tiuvespere estis aktora duopo de Leningrada Esperanto-Teatro (Soveta Unio), kiu prezentis podian koncizigon de la Ŝekspira *Hamleto*, en formo kuraĝe eksperimenta sed impona kaj atentokapta.

Kvina tago: Sur la scenejo denove estis Jadwiga Gibczynska kun sia plej nova prezentaĵo – monodramo *Zamenhof*, per kiu ŝi sukcese turneis pasintjare en Skandinavio. Poste oni ripetis la plej interesajn partojn de la programo omaĝe al Kalocsay.

Sesa tago: La vespero estis dediĉita al ripeto de la unuataga prezentaĵo de la verko de Elem, *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?*, kiun ĉi-foje spektis ĉefe neesperantista publiko, en kiu troviĝis multaj teatraj fakuloj, ĵurnalistoj kaj ĉ. 40-membra grupo de diversnaciaj turismaj fakuloj, inter kiuj pluraj altrangaj funkciuloj de Monda Turisma Organizo. La organizantoj de la vespero provizis samtempan tradukadon en la anglan kaj francan.

Sepa tago: Prezentiĝis la teatraĵo de B. Vasilev – *La aŭroroj ĉi tie estas silentaj* –, kiu antaŭ deko da jaroj

furoris en pluraj eŭropaj landoj. Iuj konsideras ĉi tiun teatraĵon, en majstra reĝisora prizorgo de István Iglódi kaj perfekta plenumo de altnivela aktora teamo, la plej rimarkinda ero de la Renkontiĝo. Al tia juĝo versâjne kontribuas la emociveka kontraŭmilita tono de la verko de Vasilev.

Oka tago: Denove "La Krizalido" el Francio, ĉi-foje kun premiera movada surscenejigo de *La evento*, de la franco Foisey. Ĉi tiu moderntema satiraĵo sufiĉe ridigis la spektantaron.

Naŭa tago: Ĝi apartenis al du amatoraj teatraj trupoj el Hungario, kiuj prezentis – en Esperanto, kompreneble – la verkon de Béla Balász, *La kastelo de la blubarba princo*, kaj la komedion de Pietro Bambi, *La naskiĝo de la relikvo*. Samtage okazis ankaŭ la tria prezento de la inaŭgura verko de Elem.

Deka tago: En la lasta tago okazis pupteatra spektaklo *Pup-cirko*, kies flua lingvaĵo konvenis eĉ por komencantoj. Oleg Papkov kaj Raŝid Hajrullin el Leningrado rikoltis multan aplaŭdon per sia prezento de dramigita rakonto de Ĉeĥov. La fina prezentaĵo de la Renkontiĝo estis la ripeto de *La aŭroroj ĉi tie estas silentaj*.

"Kompreneble, ni ripetos venontjare la plej sukcesajn aranĝojn, kiel la Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj. . .", diras unu el la eldonaĵoj de Budapeŝta Printempa Festivalo kaj ĝia organizanto Hungarlanda Turisma Oficejo. Tio devas soni kiel kuraĝigo ankaŭ por tiuj Esperanto-teatroj, kiuj ĉi-jare ne sukcesis prezentiĝi en ĉi tiu granda manifestiĝo de la Esperanta kulturo, kiun ni unuavice ŝuldas al ekstermovada iniciato kaj plenumo. Estas ankaŭ notinde, ke ĉiuj programeroj de la Renkontiĝo registriĝis sur sonbendo, kaj du el ili nigra-blanke ankaŭ sur vidbendo.

Sceno el "La aŭroroj ĉi tie estas silentaj": La soldatinoj (Eszter Szakács, Mária Ronyecz, Gabi Jobba kaj Athina Papadimitriu). **(Foto: Zoltán Fejér)**

CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO:

Konkurso pri jubilea afiŝo

DUM LA PREPAROJ por la 100-jara Jubileo de Esperanto en 1987, tra la venontaj jaroj, ni certe povos atendi amason da homoj, kiuj unuafoje serĉas informojn pri Esperanto. Sed ni ne nur trankvile atendu. Kial ni ne mem agu por estigi tian lavangon da informpetoj? Tio estas unu el la celoj de la jubilea programo: "vaste pligrandigi la nombron de simpatiantoj al Esperanto".

Por ke kresku la nombro de informpetantoj, devos kreski ankaŭ la nombro de informiloj. Interalie, UEA sentas la bezonon de nova afiŝo, ĝenerale utiligebla en klubejoj, publikaj lokoj, budoj, standoj, eble eĉ – se ĝi estas sufiĉe alloga – en la dormoĉambroj de junaj entuziasmuloj. Tial UEA nun lanĉas konkurson pri nova afiŝo, lige kun la programo por la Jubileo.

Enhavo: La afiŝo celu veki la intereson de iu, kiu neniam – aŭ apenaŭ – aŭdis pri Esperanto. Ĝi prefere havu lokon por aldoni adreso(j)n.

Teknikaj detaloj: La afiŝo povas esti plurkolora. Ne estas apartaj limigoj pri grandeco. La grafikaj elementoj devus esti jam pretaj – do UEA ne povas akcepti ideojn, kiuj postulas ankoraŭ detalan teknikan prilaboron. Tio signifas, ke esperantisto deziranta partopreni la konkurson prefere petu la helpon de neesperantista grafikisto, se tio necesas. Oni ankaŭ povas instigi neesperantistan artiston rekte partopreni.

Premio: La plej bona afiŝo estos eldonita de UEA, kaj la gajninto ricevos premion de 1000 nederlandaj guldenoj. Kompreneble, UEA rezervas la rajton ne aljuĝi la premion, se la kvalito de la konkursaĵoj ne atingos la deziratan nivelon.

Adreso kaj limdato: Sendu konkursaĵojn al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ili devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31a de decembro 1982.

Raporto de la Estraro

pri la agado dum 1981

1. ENKONDUKO

JAM IĜIS TRADICIO, ke la Estrara Raporto aperas en la revuo. Per tio oni celas maksimume konigi ĝian enhavon al la membroj, kaj tia formo de la Raporto samtempe signifas konsiderindan financan ŝparon.

La raporto traktas la laborperiodon inter la 1-a de januaro kaj la 31-a de decembro 1981.

Tiun ĉi raporton ricevas ĉiuj individuaj membroj de UEA. Kontraŭ peto al la Centra Oficejo, la raporton povas senpage ricevi ankaŭ aliaj esperantistoj.

2. ĜENERALAĴOJ

(1) Statuto kaj Ĝenerala Regularo: Fine de 1981 la Estraro ricevis propontekston por akordigi la Ĝeneralan Regularon kun la Statuto. Pli ampleksa revizia laboro daŭras.

(2) Honora Patrona Komitato: Deka membro estis aldonita, laŭ decido de la Komitato en Brazilio, al tiu komitato. Temas pri la eminenta ĉina verkisto Bakin.

(3) Honoraj membroj: La Asocio nun havas dudek du honorajn membrojn. En 1981 estis tiel honoritaj prof. C. Støp-Bowitz (Norvegio), L. Friis (Danlando) kaj S.N. Podkaminer (Soveta Unio).

(4) Komitato: La Komitato kunsidis dum la Universala Kongreso en Brazilio. La Komitato havas 80 membrojn kaj 7 observantojn.

(5) Estraro: Dufoje kunsidis la Estraro dum la jaro; marte en Roterdamo kaj aŭguste en Brazilio kaj Bona Espero (Brazilio). Parto de la Estraro kunsidis meze de novembro en Berlino.

(6) Komisionoj kaj komisiitoj: Plena listo de komisionoj kaj komisiitoj troviĝas en Jarlibro 1981. Dum la jaro okazis nur malgrandaj ŝanĝoj en la konsisto de tiuj organoj.

(7) Revizoroj: Estis reelektitaj s-roj T. Boersma kaj E.J. Woessink (Nederlando).

(8) Laborplanoj: La Komisiono pri Planado okazigis seminarion en Bad Saarow (Germana DR) en novembro 1981. Partoprenis trideko da respondeculoj. La konkludoj de la seminario troviĝos en la tagordo de la komitataj kunsidoj dum la 67a UK en Antverpeno kaj ilin diskutos ankaŭ la landaj asocioj de UEA. Tiamaniere en 1982 eblos havi aprobitan laborplanon por la venontaj kvin jaroj. Laŭ la nuna stato de la diskutoj, la ĉefa emfazo de la nova laborplano ligiĝos al esenca vastigo de la nombro de parolantoj de Esperanto kaj al la apliko de la Internacia Lingvo sur la fakaj kampoj.

(9) Landaj kaj fakaj asocioj: La nombro de aliĝintaj landaj asocioj restis je 43. Aldoniĝis unu nova faka asocio kunlaboranta (ILASE); sed la nombro de kunlaborantaj fakaj asocioj restas je 25, ĉar forlasis tiun kategorion LIBE. Tiu faka asocio por blinduloj estis akceptita de la Komitato kiel la kvara aliĝinta faka asocio.

3. ADMINISTRADO

(1) Oficistoj: La meza nombro de la oficistoj kaj volontuloj salajrataj en la CO dum 1981 estis 10,5 (kompare kun 9,4 en 1980). Post dujara anstataŭmilitserva laboro, s-ro Huibert den Draak forlasis la Oficejon en septembro. Post trijara oficado, kiu inkluzivis la redaktadon de Jarlibro, s-ino Anna Brennan forlasis la CO en decembro. Tria foriro en la jarfina periodo estis de s-ro Charles Power, kiu dum kvar jaroj plenumis ĉefe kongresajn laborojn. El tiuj tri foriroj kaj sesmonata foresto de alia administranto, pro operacio, rezultis tre fluida staba situacio jarfine. Feliĉe, ankaŭ pluraj alvenoj okazis. En decembro enoficiĝis s-ro Diccon Masterman (Britio) por transpreni la kongresajn laborojn. En la sama monato alvenis s-ro Ingvar Schoultz (Svedio) por okupiĝi interalie pri la Jarlibro. S-ro Jacques Lindau (Francio), antaŭa volontulo, fariĝis oficisto en la libroservo dum tri monatoj komence de la jaro, kiam formalaĵoj malhelpis la ĝustatempan alvenon de volontulo.



Volontula Servo estas nun konsista parto de la organiza strukturo de UEA: La juna japano Hisasi Kitagawa volontulis en Roterdamo inter junio 1981 kaj marto 1982.

(2) Volontula Servo: Jarkomence volontulis neniu, jarfine tri! En junio alvenis s-ro Hisasi Kitagawa (Japanio) por servi dum naŭ monatoj en la Libroservo. En septembro eklaboris kiel volontulo s-ro Paul

Hopkins (Kanado), kiu oficos unu jaron, parte por TEJO kaj parte pri ĝeneralaj laboroj. En oktobro alvenis tria volontulo, s-ro Robert Haddon (Britio), ankaŭ por unujara periodo. Neformale volontulis en la C.O. mallonge s-roj C. Boumal (Francio), H. Nevan (Usono), R. Horta (Brazilo) kaj G. di Paolo (Nederlando). S-ro R. Hirsch (FR Germanio) plue administris la Fondaĵon Canuto.

(3) Domo: Entreprenisto estis petita pretigi planojn por rekonstruo kaj plukonstruo de la teretaĝo.

(4) Mebloj: Bonaj ladkurtenoj estis instalitaj en la ĉefa laborĉambro de la Centra Oficejo; pluraj tabloj kaj seĝoj estis malmultekoste akiritaj.

(5) Aŭtomatigo: La komputilo (PDP 11/23) estis en februaro instalita en la CO, kune kun tajpilo kaj tri ekran-terminaloj. Poste en la jaro du pliaj terminaloj estis aldonitaj. Jarfine jam sentiĝis bezono por pliaj. Inter julio kaj decembro daŭris la giganta laboro krei programojn por la membro-administrado kaj entajpi kaj kontroli la nomojn, adresojn kaj kategoriojn de ĉiuj membroj, abonantoj kaj instancoj, kun kiuj la Asocio rilatas. Ekde la jarfino, ĉiu ekspedo de ĉiu eldonaĵo de UEA estas traktata komputile. Per tio finiĝas definitive la 'ink-fingra' aŭ 'klišara' epoko, kiu regis dum dekoj da jaroj. La komputilo estas uzata por verkado de tekstoj kaj kompilado de adreslistoj. Ĝis la jarfino estis komencita la ellaboro de programoj pri la librotenado kaj por la delegita reto en la Jarlibro.

(6) Grafika Centro Antverpeno: La antverpena oficejo sukcesis pritrakti konsiderinde pli da laboro ol dum la pasintaj jaroj. Aldoniĝis multaj kompost- kaj pres-laboroj, i.a. por Unuiĝo Franca por Esperanto. Krome, GCA transprenis preskaŭ ĉiujn ekspedojn de la Centra Oficejo, inkluzive tiun de la revuo *Esperanto*. La kvanto de laboroj por neesperantistaj klientoj kontentige altiĝadis.

Al la konstantaj oficistoj aldoniĝis f-ino Gerd Jacques kiel aganta vic-direktoro. En la priraportita jaro UEA aĉetis por GCA novan modernan fotokompostilon per kiu kaj kapacito kaj kvalito grave altiĝis. Jarfine oni laboris per ĝi 14 horojn tage. Fine de 1981 la Grafika Centro translokiĝis al la nova domo de Institucio Hodler en Antverpeno (Frankrijklei 140).

(7) Membraro: En 1981 UEA havis 29 828 aligitajn membrojn, el kiuj 8 198 estis malpli ol 26-jaraj kaj tial samtempe la asociaj membroj de TEJO. (En 1980 temis pri 27 554 kaj 7 064 respektive). La sumoj por la individuaj membroj estas: 1 239 MJ, 4 077 MA, 147 MJ-K, 258 MA-K, 984 DM (inkl. 23 DM-K) kaj 22 HM, entute 6 727 membroj (6 629 en 1980). La kresko en la nombro de individuaj membroj, rimarkita en 1980, daŭris en 1981. Pli forte kreskis la nombro de aligitaj membroj, por denove rekordi. En la pasinta jarraporto ni anoncis, ke la suma membronombro de la Asocio en 1980 (34 183) estis rekorda en la tuta historio de la Movado. La finsumo de la membraro en 1981 (36 555 individuaj kaj aligitaj membroj) trudas nun novan rekordon.

(8) Societo Zamenhof: 210 personoj membriĝis en tiu Societo en 1981 (kompare kun 226 en la antaŭaj du jaroj).

(9) Delegita Reto: Dum 1981 ĝi estis administrata en la CO prepare al la enkomputiligo de la informoj.

(10) Jarlibro: La 392-paĝa Jarlibro por 1981 aperis fine de junio. Kelkaj novaj mapoj estis aldonitaj. Pli da lokaj grupoj kaptis la okazon informi pri siaj kunvenhoroj per anoncetoj. En 1981 aperis 55 tiaj anoncetoj, kompare kun 27 en 1980. La Jarlibro estis ekspedita al la eŭropaj membroj tra FR Germanio, kaj aere tra Belgio kaj FR Germanio al la ekstereŭropanoj.

(11) Eldona agado: En la Grafika Centro Antverpeno kvar libroj estas pretigataj, sed neniu atingis pretecon dum la jaro. La Estraro aprobis eldonon de la unuaj du scienc-teknikaj titoloj fare de la nova Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto.

(12) Libroservo: Rekordaj estis la vendoj por 1981: 241 000 guldenoj, kompare kun 161 000 gld. en 1980 kaj la antaŭa rekordo de 184 000 gld. en 1979. Tio ŝuldiĝas ĉefe al la furora forvendo de *Plena analiza gramatiko* kaj la vendoj dum la 66a Universala Kongreso.

(13) Varbado: Dum la jaro UEA presis du afiŝojn. Unu en formato A3 por varbi membrojn, kaj alia en formato A4 por reklami la revuon *Esperanto*. Kun la Jarlibro dissendiĝis al ĉiu membro varbilo-mendilo por la revuo *Kontakto*. Estis pretigita ankaŭ bonveniga letero por ĉiuj novaj membroj de la Asocio.

(14) Kotizperantoj: En Israelo retiriĝis s-ino Raja Kleiman favore al nova peranto, s-ro Jehoŝua Tilleman. En Britio, de la ĉefdelegito, s-ro G. Leon-Smith, transprenis la oficon s-ro J. Rapley. Nova ĉefdelegito estis nomita por Slovakio, s-ro Š. Špigúth. En Usono la kotizperadon transprenis la landa asocio.

(15) Poŝtmarkvendado: En 1981 la vendado de poŝtmarkoj liveris nur 2400 gld. pro la okupiteco de la komisiito, s-ro Fred de Geus, kiu samtempe estas forte enplektita en la aŭtomatigan laboron de la CO. Uzitaj poŝtmarkoj restas daŭre bonvenaj ĉe la Centra Oficejo.

4. FINANCO

(1) Spezokonto: Inter la multaj preskaŭ rutinaj problemoj pri kiuj okupiĝas la Estraro de UEA, troviĝas ankaŭ la konstantaj zorgoj, ke la spezoj de la Asocio restu interne de la limoj, kiujn difinas la buĝeto. Ekzistas nur du manieroj respekti tiujn limojn: malaltigo de la buĝetitaj elspezoj aŭ akiro de novaj, nebuĝetitaj rimedoj. Pro la daŭraj kaj valoraj konsiloj de la Komisiono pri Financo kaj Administrado, la Estraro sukcesis doni la ĝustan direkton al la evoluo de la spezoj en 1981, tiel ke dank' al ŝparoj kaj novaj rimedoj, nun la kapitalon de la Asocio povas eniri pozitiva saldo de 6 223,51 guldenoj.

Inter la atentindaj plialtiĝoj je la flanko de la rimedoj, elstaras la sumoj de la membrokotizoj (+30 000 gld),

donacoj al la ĝenerala kaso (+3 200), turismaj aranĝoj (pro la flugkaravanoj al Brazilo, +5 000), rento (+14 800) kaj libroservo (+10 700 gld). Aliflanke, ĉe la elspezoj (vidu la tabelon fine de la Raporto, sub la rubriko Kostoj), okulfrapas la granda diferenco inter la buĝetita sumo por la revuo *Esperanto* kaj la realaj kostoj, kiuj superas la antaŭviditan limon je pli ol 22 000 guldenoj. Tamen, buĝetitaj estis 10 revunumeroj, kaj aperis 11. Krome, por profiti la pli favorajn poŝtajn tarifojn en Belgio kaj la tieajn laborfortojn, la Centra Oficejo transdonis preskaŭ ĉiujn ekspedlaborojn al la Grafika Centro Antverpeno. Tial inter la kostoj nun aperas sumoj por tiuj laboroj. Tamen, la samaj sumoj enskribiĝis ankaŭ kiel rimedoj de la Grafika Centro. Antaŭe tiaj laboroj neniam estis aparte kalkulitaj kaj montritaj en la spezokontoj de UEA.

Societo Zamenhof estas daŭra kaj aparte valora financa subteno al la Asocio: Du membroj de la Societo konversacias kun la prezidanto de UEA. (Foto: Z. Nikolov)

(2) **Bilanco**: La ekonomia plifortiĝo kaj tutmondiĝo de UEA – kvankam ankoraŭ modestaj – dedukteblas el diversaj bilancaj eroj: la Asocio disponas pri diverslandaj bankkontoj, inkluzive de nova konto en Hinda Unio; la valorpaperoj fine de 1981 sumiĝis pli alte ol la tuta kapitalo kaj fondaĵoj de UEA fine de 1970; konsiderinde kreskis ankaŭ la stokoj de la libroservo kompare kun la antaŭaj jaroj.

Tamen, tute alia ero igos la ĉi-fojan Bilancon memorinda: la valoro de la maŝina ekipaĵo de UEA kreskis de 58 000 fine de 1980 al 236 000 guldenoj fine de 1981. Tio do okazis en unu jaro, ĉefe pro la aĉeto de la komputilo kaj akcesoraĵoj por la Centra Oficejo en Roterdamo kaj nova fotokompostilo por la Grafika Centro en Antverpeno.

Esploro pri la financa situacio de UEA post tiuj grandaj investoj necesigas komparon de la ŝanĝoj inter la aktivoj kaj pasivoj en la bilancoj de 1980 kaj 1981. La aktivoj kreskis per 296 000 guldenoj, pro 74 000 pli da monaj kaj aliaj financaj rimedoj, 20 000 pli da provizoj, 23 000 pli por garantioj, kaj pro la jam menciitaj 178 000 pli por la maŝina ekipaĵo. La pasivoj, kompreneble, ankaŭ kreskis per la sumo de 295 000 guldenoj, pro la plusoj ĉe la kontoj: rezervoj (17 000), ŝuldoj kaj deponoj de membroj (282 000), kapitalo (21 000), sed kun malkresko ĉe la fondaĵoj (-25 000).

La konkluda konstato do estas, ke ni investis ne per samtempa plialtiĝo de la kapitalaj kontoj, sed dank' al la antaŭricevitaj rimedoj, nepagitaj ŝuldoj (parte), kreditoroj, sed ankaŭ dank' al la fiksdataj deponoj de la membroj (+47 600 gld). En unu jaro la aspekto de la bilanco ŝanĝiĝis pro la administra revolucio, kiun UEA devis sekvi, se ĝi volas evolui al forta kaj mondskale strukturita organizaĵo. Tamen, simila financa streĉo ne devus estonte ripetiĝi sen samtempa kresko de la kapitalo de la Asocio.

5. INSTITUCIO HODLER '68

(1) Estraro kaj administranto: Post la retiriĝo de la tiama prezidanto de Institucio Hodler '68 kaj nuna prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, estis elektita kiel prezidanto E.J. Woessink. Fine de la jaro 1981 retiriĝis el la estraro E.L.M. Wensing. Administranto restas V. Sadler.

(2) Subvencioj: Estis distribuitaj 7 500 guldenoj por subvencii jenajn instancojn kaj agadojn: Eŭropa Esperanto-Centro (1 000 gld.), Flandra Esperanto-Ligo (500), Junulara Kulturdomo en Varsovio (250), Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj (450), sliparo pri leĝa situacio de la E-instruado (200), Fondaĵo Oficeja Ilaro (2000), Someraj Universitataj kursoj (600), Komisiono pri Virina Agado (500), Nov-Jorka Oficejo de UEA (1000) kaj Budapeŝta Centro por Sciencteknika kaj Eldona Agado (1000 guldenoj). – La ĝisnunaj subvencioj, per kiuj Institucio Hodler subtenis la Movadon tra la jaroj baldaŭ atingos la sumon de 100 000 guldenoj (temas ĝis nun pri 95 050 guldenoj).

(3) Domo en Antverpeno: La 10an de majo 1981 estis solene inaŭgurita la nova domo de Institucio Hodler en Antverpeno, kiu estas nun komune uzata de la Grafika Centro de UEA, de Flandra Esperanto-Ligo kaj de la antverpena klubo "La Verda Stelo", laŭ kondiĉoj fiksitaj en lukontraktoj. Partoprenantoj en la ĉi-jara Universala Kongreso estos invitataj viziti ĝin kaj persone konstati la taŭgecon de tiu domo por

INSTITUCIO HODLER NE DONOS SUBVENCIOJN DUM ĈI TIU JARO

Pro la aĉeto de la nova propra domo en Antverpeno (fine de 1980) kaj pro la fakto, ke en 1981 tiu domo ne estis uzata kaj postulis amason da riparelspezoj, Institucio Hodler ne donos subvenciojn por ĉi tiu jaro. Male, oni ĉi-jare povus subteni la Institucion mem! Unu el la manieroj fari tion estas aĉeti ĉambro-nomojn en la nova antverpena domo. Tian donacon de dek mil guldenoj jam faris tri grandanimaj esperantistoj.

movadaj celoj. Eblos ankoraŭ definitive decidiĝi pri 'aĉeto' de propra ĉambro laŭ la alvoko aperinta en la pasintjara junia numero de ĉi tiu revuo.

6. REVUO

(1) Redaktoro: Simo Milojević. La novembran numeron redaktis Anna Brennan. Konstantajn rubrikojn prizorgis: B. Golden (Ekzameno E, kiu aperis ĝis julio) kaj G. Larglantier (Radio). Ne funkciis la prizorganto de la TEJO-paĝo, sed la rubriko tamen regule aperis.

(2) Amplekso kaj enhavo: La jarkolekto 74 (1981) ampleksis 220 paĝojn. Kontribuis ĉ. 75 aŭtoroj. Kiel en antaŭaj jaroj, la revuo klopodis speguli la agadon de la tuta Esperanto-movado, kun aparta atento al la laboro de UEA. Kulturo, i.a. pro la temo de la 66a UK en Brazilio, estis la ĉeftemo de la revuo tra 1981. Brazilo kiel la aktuala kongresa lando ricevis apartan atenton. Amplekse oni traktis ankaŭ la temojn pri handikapuloj, Jubilea Jaro 1987, turismo, generaciaj aspektoj de la Movado, aŭtomatigo de UEA kaj Esperanto-instruado. La landaj movadoj en Ĉinio, Korea Respubliko, Rumanio kaj Germana DR detale prezentiĝis, kvankam la revuo atentis ankaŭ la evoluon de la agado pri Esperanto en kvardeko da aliaj landoj. En julio la revuo aparte markis la 80-jariĝon de prof. Gaston Waringhien kaj la 100-jaran jubileon de la fama ĉina verkisto Lusin. Tradicie, la tuta septembra numero dediĉiĝis al la 66a UK kaj la 37a IJK de TEJO. La Estrara Raporto pri 1980 okupis la plimulton de la maja numero. Grava novaĵo estis la produkto de la speciala numero por la komencantoj en novembro 1981. Venis kaj ankoraŭ venas multaj reagoj pri tiu numero. La Estraro studas tiujn reagojn kaj provos veni al adekvataj proponoj kaj solvoj pri la konstanta prizorgo de la novuloj en la Internacia Lingvo. Ĝenerale, la revuo ankoraŭ ĝuas la renomon de la gvida periodaĵo en la Esperanto-movado kaj kiel sian ĉefan celon vidas la regulan provizadon de la aktivuloj per fidindaj kaj aktualaj informoj pri la disvolviĝo de la Esperanto-agado sur ĉiuj laborkampoj.

(3) Teknika prizorgo: La redaktoro zorgas pri la teknika aspekto de la revuo. Montriĝas necese baldaŭ redesegni la aspekton de la gazeto, kun la ĉefa celo vigligi kaj modernigi ĝin. Kompostajn kaj aliajn teknikajn laborojn plenumis la CO en Roterdamo kaj la Grafika Centro en Antverpeno. Presis la firmao Tuijtel (Nederlando). Kiel dum kelkaj antaŭaj jaroj, valoran helpon donis s-ino Rejna de Jong, kiel regula kaj rapida eksteroficeja provleganto.

(4) Abonantaro, eldonkvanto, anoncoj: La eldonkvanto estis meze 9 500, kvankam ĝi variis inter 8 500 kaj 11 000 ekzempleroj. La revuo havis en diversaj membro- kaj abon-kategorioj entute iom malpli ol 8 000 abonantojn. En 1981 la pagitaj anoncoj enspezigis preskaŭ 16 000 gld.

(5) Ekspedo: La meza aperdato estis la 17a de la koncerna monato. Dum la jaro oni rezignis pri la ekspedvojo tra Londono kaj transiris al aera ekspedo el Antverpeno. Tio ŝajnas solvi ĉiujn ĝisnunajn problemojn ĉi-rilate, ĉar la legantoj ricevas la revuon multe pli rapide ol dum pluraj pasintaj jaroj.

7. KONGRESOJ

(1) La 66a Universala Kongreso en Brazilio: 1749 aliĝintoj el 49 landoj (inter ili pli ol 1000 sudamerikanoj) partoprenis ĉi tiun unuan sudhemisferan, la plej grandan ekstereŭropan Universalan Kongreson. En ĝia kadro okazis la 34a sesio de Internacia Kongresa Universitato, kiu konsistis el 13 prelegoj; la 4a Esperantologia Konferenco havis tri kunsidojn, kun pluraj prelegoj kaj debato. La Kongreso amplekse traktis la ĉeftemon "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj", pri kiu temis ankaŭ la kongresa rezolucio. Okazis kurso pri la portugala, progresiga kurso de Esperanto kaj konversaciaj rondoj por ne-esperantaj parolantoj. Kun la helpo de gejunuloj de BEJO, la libroservo funkciis tre bone. Granda atento en la brazilaj gazetaro, tele-



Granda interesiĝo de la ekstermovada publiko pri la 66a UK en Brazilio: S-roj A. Chaves, vicprezidento de Brazilo, kaj J. Lins de Albuquerque, prezidanto de LKK.

vido kaj radio estis la sekvo de la bone funkcianta gazetara servo.

(2) La Kongresa Regularo estas reviziita de la kongresa administracio kaj traktata de la Komisiono pri Kongresoj. Ĝi devus en 1982 veni al la Komitato.

(3) Enketo: En nia pasintjara raporto ni jam aludis la demandon pri ŝanĝoj en la Universalaj Kongresoj. Dum la UK en Brazilo estis disdonitaj enketiloj pri la UK. Nur kelkdeko respondis dum la UK mem; poste alvenis al la CO ankoraŭ manpleno da respondoj. El tia materialo nenio firme konkludeblas. Tamen, la ĝenerala impreso el la respondoj – simile al antaŭaj enketoj – estas, ke per radikalaj ŝanĝoj oni kontentigus nur malmultajn. Tio tamen ne koncernas renovigojn kaj refreŝigojn de la tradicia kongresa programo, kiuj ĉiam estas bonvenaj.

(4) Kia kongresa programo? Ni momente plenigas la kongresan semajnon per statute kaj regulare preskribitaj kaj per tradicio evoluintaj programeroj. Ni kun skeptiko aŭdas la esprimon 'modernaj' konferencoj, de kiuj onidire niaj Kongresoj povus 'lerni'. Tio ne funkcius kaj ne necesas. Niaj ĝisnunaj spertoj montras, ke tiaj konferencoj havas, same kiel la niaj, amason da dumtagaj laborkunvenoj, sed ne vere proprajn vesperajn aranĝojn. Kontraŭe ni tradicie havas ĉiuvespere aranĝojn, kiuj estas ĝueblaj nur dum la Universalaj Kongresoj. Tiuj vesperoj ne estas statuta aŭ regulara neprajo, sekve, ili estus plej facile forigeblaj por krei pli da spaco en la taga programo kaj havi malpli da paralelaj aranĝoj. Sed ni simple ne povas imagi, ke plimulto de la kongresanoj akceptus forigon de nacia, teatra, bala kaj koncerta vesperoj.

Estas ĝojige konstati, ke la Movado havas grandan kvanton da altnivelaj artistoj, kiuj pretas disponigi sin al la Kongresoj. Kio mankas, estas koherigo de la artaj prezentajoj. Bonvene estus, se la artistoj ne nur anoncus sian pretan programon al la organizantoj, sed en pli frua, prepara stadio kontaktus ilin cele al pli konscia arta 'politiko' de la Kongreso.

La Infana Kongreseto ne estas statute necesa. Sed la Infana Kongreseto estas neprajo, ne nur por ke gepatroj tie parku siajn infanojn, dum ili mem partoprenas la (rekte kontraŭinfanan) UK, ne nur pro la bona 'vendovaloro' ĉe la amasmedioj, sed ĉefe por ke infanoj tie lernu aprezi en propra medio la neceson kaj valoron de Esperanto.

(5) Estontaj kongresoj: En la venontaj jaroj ni kongresos en Budapeŝto, Vankuvero kaj Aŭgsburgo. Por pli poste, ekzistas interesaj invitoj el Ĉinio kaj Aŭstralio.

Inaŭguro de la 66a UK en la Federacia Parlamentejo: Brazilo levis la prestiĝon de la Universalaj Kongresoj donante al la 66a UK unuarangajn lokon kaj atenton.

8. INFORMADO

(1) Enkonduko: Principe, ekzistas du aspektoj de la informado: unuflanke estas la konstanta mesaĝo pri la Internacia Lingvo kiel solvo de la monda lingva problemo, kaj aliflanke la porokaza informado pri la agado de la homoj, kiuj jam uzas tiun solvon, montrante en la praktiko, ke ĝi funkcias kaj kiel ĝi funkcias. Analizante la faritan laboron sur la du kampoj, ni devis konstati, ke estas multe pli facile provoki intereson aktivan de la ekstera publiko, se oni parolas pri la aplikado de Esperanto (kongresoj, seminarioj, sociaj taskoj, kuriozajoj), ol se oni provas teorie konvinki la homojn pri la valoro de Esperanto, precipe se ili ne suferas la lingvan problemon pro sia geografia aŭ politika situacio. Grava demando estus – kial tio? Ĉu Esperanto ne reprezentas por ĉiuj homoj la grandan valoron, kiun ni vidas en ĝi? Ĉu ni simple ne kapablas trafe informi, taŭge komuniki? Ni sentas, ke ni estas ĉe ia vojkruciĝo tiusence. Ni ne devas daŭrigi la malnovan sistemon de la informado; ni devas profunde studi la mankojn kaj eltrovi novan vojon. La tuta agado de la jaro 1981 estis sub la signo de tiu koncepto.

(2) Komisiono pri Informado: Kvankam ne en plena konsisto, la Komisiono kunsidis dufoje dum la jaro: en Brazilio, okaze de la Kongreso, por aŭskulti la raporton kaj ricevi sugestojn – cetere tre interesajn kaj utilajn!– de pluraj kongresanoj, kaj en oktobro, en Roterdamo, dum dutaga Seminario pri Informado. Tiu seminario estis la kulmino de la tuta komisiona laboro ĝis nun, kaj ni esperas, ke ĝi kreis la bazon por la estonta agado. Membroj de la Komisiono, aktivuloj de TEJO kaj pluraj aliaj kunvenis tie, por analizi la inform-agadon kaj fiksi prioritatojn.

(3) Kongresa Informado: En 1981 la Esperantomovado okazigis centojn da kunvenoj, kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj feriaj aranĝoj. Ĉiuj el ili estis – aŭ povis esti – taŭgaj pretekstoj por informado pri Esperanto al la ekstera publiko.

Uzante la spertojn de la svedaj kolegoj okaze de la 65a UK en 1980, antaŭ la Kongreso en Brazilio la

Informa Fako eldonis regule, trifoje monate, komunikojn en la portugala lingvo kaj dissendis ilin, al pli ol 150 gazetoj, radio- kaj televid-stacioj, en ĉiuj brazilaj ŝtatoj. La rezulto estis pli ol kontentiga, ĉar centoj da artikoloj kaj mencioj en radio kaj televido temis pri Esperanto. La korespondanto de grava internacia novaĵagentejo (AP) utiligis plurfoje niajn komunikojn, kaj ili aperis en aliaj sudamerikaj ŝtatoj. Ekspozicio aranĝita de la Ministerio por Sano, publikaj deklaroj de registaraj aŭtoritatuloj, ĉiutagaj radioelsendoj en Esperanto al eksterlando pri la UK, tagnovaĵoj por la kongresanoj en la kongresurbo – jen bona, imitinda informagado por niaj venontaj kongresoj.

Kurioze, sed vere, apartenas ĉi-foje al la kongresa informado ankaŭ tio, kion spertis en Brazilio la brazilaj esperantistoj: ili vidis unuafoje kiel praktike funkcias kongreso kun homoj el multaj landoj. Centoj da brazilanoj neniam antaŭe spertis kiel Esperanto vere funkcias en kongreso; multaj miris kaj konvinkiĝis post jaroj da pasiva esperantisteco!

(4) Internaciaj kongresoj, konferencoj, foiroj: Informado pere de aktiva partopreno en ne-esperantistaj kunvenoj – jen unu el la novaj prioritatoj de UEA. En la vastega Librofoiro de Frankfurto, dank' al persona iniciato de eldonisto, oni atingis notindan informefikon. En pluraj sciencaj konferencoj (Baku, Budapeŝto), la ekstera publiko havis okazon informiĝi pri Esperanto. Mankas ĉi-rilate baza nacilingva informilo, kaj ĝi nun troviĝas inter la prioritatoj de la Komisiono pri Informado.

9. EKSTERAJ RILATOJ

(1) Enkonduko: Se oni prenus en konsideron la nunajn agadliniojn de UEA kaj la limigon je ĝiaj financaj kaj homaj fortoj, ĝiaj eksteraj rilatoj konsistus, en plej bona okazo, el jenaj elementoj: **a)** bone funkcianta oficejo ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, kun regula kontakto kun instancoj kaj funkciuloj de UN kaj kun la misioj de la ŝtatoj-membroj; **b)** plene laborkapabla komisiono ĉe Unesko en Parizo, kun simile regula kontakto kun Unesko mem kaj kun la unuopaj delegacioj; **c)** efika laboro ĉe la ĉefaj aliaj internaciaj kaj regionaj interŝtataj organizaĵoj; **ĉ)** proksimaj rilatoj kun internaciaj neregistaraj organizaĵoj; **d)** subtena ekstera agado je nacia nivelo; **e)** bone funkcianta komunikado inter la aktivuloj sur la kampo de eksteraj rilatoj kaj la Esperanto-publiko. Jen la efektiva situacio, kiu montras jen bonon jen malkontentigan progreson.

(2) Unuiĝintaj Nacioj: La Nov-Jorka Oficejo trairis krizan periodon en la mezo de la jaro, parte pro manko de mono kaj parte pro administraj problemoj. Ambaŭ problemoj estis venkitaj; la unua dank'al la sindona helpo de multaj anoj de UEA, kiuj fariĝis Amikoj de la Nov-Jorka Oficejo, kaj la dua per nomigo de s-ro Leonard Dzelzitis kiel Aganta Direktoro (ekde septembro) kaj de s-ino Neelu Dhar (ekde decembro) kiel gvidanto de la eksteraj kontaktoj de la Oficejo. Ambaŭ funkcioj estas parttempaj.

La Amikoj de la Oficejo nun nombras preskaŭ 300. Tra la jaro ili kontribuis pli ol 16 000 dolarojn, parte pere de la Klubo 777, kies anoj kontribuas la kotizon de po 777 dolaroj jare. Ĝis nun la Oficejo havas dek tiajn membrojn, kies kotizoj eniras specialan konton.

Per la Oficejo oni prizorgas korespondaĵojn, respondas informpetojn (interalie de la gazetaro), funkciigas kursojn por anoj de la UN-sekretariato kaj aliaj personoj ligitaj al UN, kaj aranĝas kunvenojn de la Laborgrupo por Esperanto ĉe UN. Tiu Laborgrupo konsistas el dudeko da membroj. Ĝia Administra Komitato direktas la laboron en Nov-Jorko sub prezido de prof. Humphrey Tonkin.

UEA aktive partoprenas ĉiujn ĉefajn laborojn de UN, kiuj iel rilatas niajn interesojn. Ĝi estas regula ĉeestanto de aranĝoj por neregistaraj organizaĵoj (NROj), havas multajn kontaktojn kun la Sekretariato, kaj de tempo al tempo kontaktiĝas kun unuopaj misioj aŭ dissendas al ili materialon. En oktobro kaj novembro ĝia laborforto estis pligrandigita de s-ro Tibor Sekelj (v. sube). La 15an de decembro okazis la jam tradicia akcepto okaze de la Zamenhofa Tago, ĉi-jare kun muzikaj kaj dancaj prezentoj, kaj kun ĉeesto de reprezentantoj de misioj kaj de la UN-sekretariato.

En julio okazis la usona Esperanto-kongreso en Nov-Jorko. Ĝi havis en sia programo kunsidon pri "Esperanto en la servo de UN" en la aŭditorio de la Sekretariato (la teksto de la prelego de d-ro Tonkin aperos kiel *Esperanto-dokumento*). Dank'al interveno de la Laborgrupo, la Urbestro de Nov-Jorko proklamis la koncernan semajnon Semajno de Internacia Amikeco kaj Esperanto.

UEA estas organizaĵo "sur la listo" de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, kio ebligas al ĝi partopreni la oficialan agadon de UN. Ĝis nun ĝi tie troviĝis pro la jamaj konsultaj rilatoj kun Unesko, sed en 1981 la Komitato de UN pri Neregistaraj Organizaĵoj igis ĝin plenrajta, do kun oficialaj rilatoj kun UN, sendepende de la ligo kun Unesko.

(3) Unesko: En 1956 en Nova Delhio, la Ĝenerala Konferenco de Unesko lanĉis la grandan projekton por reciproka aprezado de la valoroj de Oriento kaj Okcidento. Honore al la 25a datreveno de la lanĉo de la projekto, delegacio de UEA, sub gvido de la prezidanto, s-ro Maertens, en marto prezentis al la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro M'Bow, la tutan ĝis nun aperintan kolekton de la serio Oriento-Okcidento, la ĉefa kontribuo de UEA kaj la Esperanto-eldonejoj al la projekto. Tio donis bonegan okazon por interŝanĝi ideojn kun la ĝenerala direktoro koncerne la estontajn agadprogramojn de UEA kaj de Unesko.

Kiel sekvo de tiu renkontiĝo, en novembro delegacio de UEA vizitis plurajn funkciulojn de Unesko por detaligi kelkajn novajn ideojn por kunlaboro. Inter la vizititoj estis la vica ĝenerala direktoro, s-ro Najman. Unu el la delegacianoj estis s-ro Sekelj, kiu poste restis

La rilatoj inter UEA kaj Unesko fariĝas ĉiam pli kaj pli intimaj kaj ambaŭflanke utilaj: UEA-delegacio ĉe la Ĝenerala Direktoro de Unesko en Parizo, en marto 1981. (Foto: Michel Claude)

en Parizo unu monaton por fari kontaktojn kun delegacioj ĉe Unesko (v. *Esperanto*, februaro 1982).

Ĉefe interesas UEA en la nuna momento pli forta emfazo en la programoj de Unesko je la intima rilato inter komunikado kaj lingvaj demandoj, kaj pli da atento flanke de Unesko al la atingoj de Esperanto kaj al la baldaŭ okazonta Jubileo de la lingvo. Kontaktoj kun la instancoj de Unesko estas tre bonaj, sed necesas intensigi ilin.

(4) Aliaj Interŝtataj Organizaĵoj: Sub gvido de ties direktoro, f-ino Anne Tilmont, Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo daŭrigis informadon ĉe la eŭropaj instancoj. La laboro de EEC, kvankam intime ligita al UEA, okazas esence ekster ĝia kadro. Ĝi aparte intense uzas la eldonaĵojn de UEA en la informlaboro, kaj ĝi kunordigas Eŭropan Esperanto-Union, kiu konsistas el la Esperanto-asocioj de landoj de Eŭropa Komunumo. EEC retrovis la spuron de la dokumento Patterson (PE 64 883). Tiu raporto de la Parlamenta Komisiono pri Kulturo, Edukado, Informado kaj Sporto proponas starigon de laborgrupo, kiu interalie enketu pri Esperanto. EEC laboras por efektivigo de la raporto, kaj faras sian eblon por influi la lingvopolitikon de la Komunumo laŭ pozitivaj direktoj. Kvankam la laboro de EEC estas en multaj rilatoj modela, ĝia financa situacio estas tre malforta kaj ĝi bezonas pli aktivan subtenon de la koncernaj landaj Esperanto-asocioj.

Ĉe la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj UEA esploras okazigon de scienca konferenco sub aŭspicio de OAŜ, kaj ĝi ankaŭ daŭrigas sian kunlaboron kun OAŜ.

En la januara numero de la revuo aperis ampleksa raporto pri la agado kunlige kun la baldaŭ okazonta Monda Turisma Konferenco. La pasinta konferenco akceptis rezolucion favoran al Esperanto. Nun en Meksiko oni planas plian konferencon, en kiu certe aktivos la komisiito de UEA pri kontaktoj kun Monda Organizo pri Turismo, s-ino Lucy Harmon (Usono), kaj anoj de la diversaj delegacioj, precipe la hungara.

En Brazilio, la Komitato de UEA nomis s-ron Tibor Sekelj (Jugoslavio) komisiito pri kontaktoj kun la Movado de Nealiancitaj Landoj. De post tiam, s-ro Sekelj pasigis unu monaton en Nov-Jorko kaj unu monaton en Parizo por kontakti la reprezentantojn de tiuj landoj kaj pretigi la grundon por novaj iniciatoj, ne nur en tiu movado, sed ankaŭ en UN kaj Unesko. S-ro Sekelj ankaŭ verkis tiucelan *Esperanto-dokumenton* kaj ĝi estis amase distribuita en Parizo kaj Nov-Jorko.

(5) Neregistaraj Organizaĵoj: La Laborgrupo en Nov-Jorko proksime rilatas kun NROj, kiuj havas rilatojn kun UN. Ĝi estas membro de la Konferenco de NROj kaj ano de ties komitatoj pri junularo kaj pri pliaĝuloj. Ĝi regule ĉeestas kunvenojn de reprezentantoj de NROj kaj aktive laboras en diversaj programoj de UN, ekzemple tiu pri malarmado. Ĉe Unesko en Parizo, la laboro inter NROj estas unuaranga. UEA estis reelektita en junio kiel ano de la Konstanta Komitato de la Konferenco de NROj ĉe Unesko, tre influa pozicio. En kunlaboro kun du aliaj organizaĵoj, ĝi kunordigas kolokvon pri kulturaj valoroj kaj amaskomunikado,

kiu okazos en Unesko en novembro. La kolokvo fontas el decido de la Konstanta Komitato, laŭ propono de UEA, starigi laborgrupon pri komunikado, kiun UEA estras. S-ro E. Chicot, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, ĉefe gvidas la agadon sur tiu tereno.

Okazas ankaŭ kun aliaj NROj, sendepende de UN kaj Unesko, multaj kontaktoj. Pluraj NROj, ekzemple, partoprenis kiel observantoj partojn de la UK en Brazilio.

(6) Nacia Agado: Ĉar tiu agado okazas precipe ekster la kadro de la centra UEA, necesas nur mencii ĝin ĉi tie. Ĝi inkluzivas elstaran parlamentan agadon en kelkaj landoj (ekz. Britio, Francio, Eŭropa Parlamento), proksimajn rilatojn en aliaj landoj kun profesiaj kaj akademiaj organizaĵoj (Hungario, Rumanio, Ĉinio), kaj efikan agadon inter diversaj naciaj amasmovadoj. Relative mankas, tamen, efika kunordigo inter tiuj diversaj naciaj iniciatoj kaj la internacia agado de UEA.

(7) Komunikado kaj partopreno: La Internacia Jaro pri Handikapitoj (1981) donis al UEA escepte bonan okazon por partopreni agadon de UN kaj samtempe atenti pri propraj internaj problemoj. Tra la jaro aperis dekoj, eble eĉ cento, da artikoloj en la Esperantogazetaro pri la Jaro, parte instigitaj de gazetaraj komunikoj senditaj el la Nov-Jorka Oficejo. Kunveno organizita de UEA dum la UK en Brazilio rezultigis rezolucion akceptitan de la Komitato de UEA, laŭ kiu oni dediĉu apartan atenton al la bezonoj de handikapuloj en la programoj kaj aktivecoj de UEA. La laboron sur tiu tereno gvidis s-ino Michela Lipari (Italio).

La bulteno *UN kaj Ni* daŭre aperis tra la jaro sub lerta redakto de s-ino Akiko Woessink-Nagata, kaj ĉefe funkciis kiel interligilo de la diversaj aktivuloj pri UN kaj Unesko. Interalie ĝi ligis al la UN-laboro la reprezentantojn de UEA ĉe UN en Ĝenevo (s-ro Claude Piron) kaj Vieno (d-ro H.M. Maitzen).

(8) Konkludo: La eksteraj rilatoj estas sur bona vojo, sed ekzistas kelkaj problemoj en meza kaj pli longa perspektivo. Unu el la ĉefaj estas la manko de sufiĉa kunordigo inter la agadkampoj. Sentiĝas manko de bonaj metodoj por enkonduki novajn kunlaborantojn kaj doni al ili konsilojn. Aldoniĝas al tio manko de sufiĉaj kontaktoj kun unuopaj organizaĵoj. Ĝenerale, tamen, okazas sentebla progreso, precipe en la agado en Nov-Jorko kaj Parizo.

10. KULTURO KAJ EDUKADO

(1) Kulturo: Kiel menciite en la Estrara Raporto pri 1980, la estrarano pri kulturo iniciatis malfrue en tiu jaro diskuton pri baza kulturpolitiko de UEA kaj rilataj aferoj. Dum 1981 tiu diskuto daŭris diverskampe: en amaso da leteroj al la koncerna estrarano, en iuj revuoj (ekzemple *Hungara vivo* kaj *Literatura foiro*) kaj en kunsidoj okazantaj dum la 66a UK en Brazilio. Du oficialaj artikoloj pri la temo aperis en la revuo de UEA: "Memornotoj pri kulturpolitiko"

La teatra arto en la Internacia Lingvo spertas nuntempe ĉiam pli grandan popularecon kaj atingas novajn kvalitonivelojn: Sceno el "Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?" de János Elem, en la Teatra Festivalo en Budapeŝto, meze de marto 1982 (vidu la paĝon 81 en ĉi tiu numero). **(Foto: Éva Keleti)**

(aprilo, p. 64-65) kaj "Tra informiĝo al kulturgenero" (decembro, p. 205-206), al kiuj interesitoj turnu sin por detaloj.

Rezultojn kaj konkludojn post tiu unujara prikultura diskutado jam eblas formuli jene:

a) formiĝis eksplicita bazo por pli ampleksa kulturkonscia kunlaboro inter UEA kaj diversaj landaj asocioj kaj individuoj. La multaj subtenaj reagoj al la esprimitaj gvidideoj pri nia kulturpolitiko permesas la interpreton, ke ties disvolvado sur difinita kulturfilozofia bazo estas bezonata kaj formulado de niaj kulturaj celoj necesa por subteni nian mondvastan kulturlaboron.

b) Evidentiĝis, ke senteblas bezono de ponto inter iuj kulturvidpunktaj 'ekstremoj' en la Movado. Reagoj rilataj al ĉi tiu aspekto de la kulturlabora komplekso montras, ke la koncernatoj ne malfavoras tian ampleksan provon al kultura pridiskutado, kiu evidente enhavas proponon al dialogo kaj kunlaboro inter vidpunktoj iuface diferencaj (vd. ekzemple *Literatura foiro,* aŭgusto 1981, p. 11-12).

c) Konstateblas, ke multaj rigardas UEA kiel unuavice kulturan asocion, kun tiurilata respondeco antaŭ la tutmonda esperantistaro. Tiuj des pli bonvenigas rekonsideron de ĝiaj kulturpolitiko kaj kulturagado kaj subtenas seriozan serĉon de nova laborbazo, kiu samtempe povus libere servi al la Esperanto-movado ĝenerale.

ĉ) Diversaj atentindaj ideoj kolektiĝis dum la menciita prikultura diskutperiodo (vd. la menciitan artikolon en *Esperanto,* 205-206). Certe multaj el ili ne estas novaj, sed tamen, tiel prezentitaj sur difinita bazo, ili efikas pli kuntenece kaj pli manipuleblaj en servopretan tutaĵon. Estas tiel atendeble, ke konkretigo de iuj akcelas konkretigon de pliaj.

En la 66a UK la Komitato de UEA esprimis subtenon pri la farata esplorlaboro sur la kultura kampo kaj komisiis al la estrarano pri kulturo daŭrigi ĝin. Inkluzivite estas, ke novaj vojoj en la kulturagado de UEA estas serĉendaj kaj provendaj.

La ĉeftemo de la 66a UK, "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj", estis preparata sub respondeco de la estrarano pri kulturo. Ĝian pritrakton resumis la Kongresa Rezolucio, kiu akcentis la potencialon de Esperanto krei plenkomunikan ponton inter la diversaj kulturoj de la mondo. Aparta kajero pri la temo aperos en la serio de *Esperanto-dokumentoj.* Dum la Kongreso okazis ankaŭ gravaj kulturaj kontribuoj kaj diskutoj en la kadroj de la Internacia Kongresa Universitato kaj la 4a Esperantologia Konferenco.

La Belartajn Konkursojn de UEA por 1981 partoprenis entute 48 personoj el 16 landoj per 105 verkoj. La nombro de konkursaĵoj estis preskaŭ la sama kiel en la antaŭa jaro. 12 premioj kaj 4 laŭdaj mencioj estis aljuĝitaj. Pro malsukceso de la eksperimenta branĉo "porinfana literaturo" en la pasintaj du jaroj, la Estraro de UEA decidis elfaligi tiun branĉon, kaj dediĉi anstataŭe unu premion al tiu infanlibro, eldonita en la konkursjaro, kiu enhave kaj aspekte juĝiĝos la plej elstara. (Vidu pri tio anoncon en *Esperanto,* oktobro 1981, p. 167).

(2) Eldonado: La sekvantaj verkoj, eldonotaj de UEA, estas nun presataj kaj espereble aperos en tiu ĉi jaro: *Faktoj kaj fantazioj,* legolibro por studantoj, de d-rino Marjorie Boulton, *Esperanto laŭ Inter-metodo,* rektmetoda lernolibro por kursoj kaj memlernado, de Antonín Slanina, kaj *Kiuj semas plorante,* la premiita romano en Konkurso Raymond Schwartz en 1980, de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal. Por la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto ekzistas aparta eldonplano, kiu komencos realiĝi ekde tiu ĉi jaro. En la Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicio de UEA aperis en Hungario granda kolekto en du volumoj de poeziaj tradukoj de Kalocsay sub la titolo *Tutmonda sonoro,* kaj en Italio *La sonetoj* de William Shakespeare, en traduko de William Auld.

(3) Edukado: En marto Humphrey Tonkin, laŭ propra peto, estis senŝarĝigita de la fako Edukado, kiun transprenis Baldur Ragnarsson. Surbaze de lia preparlaboro, dumkongresa komisiono de edukado en Brazilio faris tri proponojn al la Komitato de UEA, kiu aprobis ilin kiel rezoluciojn pri ekzamenoj, lernolibroj kaj konstanta kongresa tago pri edukado. La koncernaj preparlaboroj por efektivigi tiujn rezoluciojn estis komisiitaj al la estrarano pri edukado. Ĝis nun Internacia Ekzamena Komisiono por Elementa kaj Meza ekzamenoj de UEA estas starigita, kaj regularo pri tiuj ekzamenoj verkita kaj reviziita por antaŭmeto al komitata pritrakto. Lernoprogramoj por la samaj ekzamenoj estas en preparado. Regularo por Supera Ekzameno estas sub konsidero surbaze de la regularo pri la antaŭa Internacia Ekzamena Komisiono. Antaŭ ol proponi planon pri eventuala serio de novaj lernolibroj kaj instrumaterialo, detala esploro estas necesa; tiu laboro estas komencota. La "Tago de la Lernejo", kun prelegoj, modellecionoj kaj libroekspozicio, okazos por la unua fojo en la 67a UK en Antverpeno.

11. JUNULARA SEKCIO
(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) Enkonduko: 1981 estis por TEJO jaro de ŝanĝoj kaj de novaj planoj. En tiu jaro elstaris la agado ekster Eŭropo. TEJO kongresis en Meksikio; plu evoluis la kontaktoj kun la junularo en orienta Azio; signife vigliĝis la eksteraj rilatoj, kaj denove kreskis la nombro de la Patronoj kaj de la abonantoj de *Kontakto*.

(2) Komitato: La Komitato en 1981 konsistis el 49 personoj. Ĝi kunsidis dum la 37a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Oaxtepec (Meksikio), sed pro manko de kvorumo ĉiuj decidoj estis poste metitaj al skriba ratifado. Kvar specifaj komisionoj estis starigitaj.

(3) Estraro: Nova Estraro estis elektita dum la 37a IJK kaj poste ratifita. La nova Estraro, elektita por du jaroj, konsistas el 8 personoj. La Estraro kunsidis en orienta Berlino (junio), en la IJK kaj en La Chaux-de-Fonds (novembro).

(4) Membraro: Dum 1981 la individua membraro de TEJO refoje kreskadis, de 382 al 428. Pro nepago de kotizoj bedaŭrinde eksiĝis la landaj sekcioj en Aŭstralio, Ĉilio, Kolombio, Meksikio kaj Usono. Fine de la Jaro TEJO havis 8198 asociajn membrojn kaj 24 landajn sekciojn.

(5) Eldonaĵoj: Ĝis la fino de 1981 aperis tri el la kvar numeroj de *Kontakto* en la jarkolekto. Tiuj tri numeroj prezentis amplekse i.a. la temojn: "Bildrakontado kaj sciencfikcio" kaj "Paco – malarmado – armeoj". Ĉiuj estis redaktitaj de Dario Besseghini (Italio) kaj Charles Power (Nederlando). Unu numero traktis la

temon de la 25a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo kaj estis distribuita al ĉiuj partoprenantoj. *Kontakto* iras al ĉiuj individuaj membroj de TEJO/UEA, 51 Patronoj, 252 unuopaj kaj 120 kolektivaj abonantoj – entute 851 ricevantoj.

Ian Jackson (Britio) redaktis la kontribuon de TEJO al *Koncize*, bulteno de TEJO kaj pluraj landaj sekcioj en Eŭropo. La oficiala organo, "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto*, aperis 10-foje dum la jaro. *NNN* (*News, Novaĵoj, Nouvelles*), bulteno sendata al pliampleksiĝanta aro da aliaj internaciaj junularaj organizaĵoj, dufoje aperis. *Monda ekonomio*, raporto pri la seminario de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO okazinta en Strasburgo (v. sube), aperis libretoforme sub redakto de Martin Haase.

(6) Servoj: La Pasporta Servo denove vastiĝis en 1981, proponante gastigon ĉe 410 adresoj en 48 landoj. La Turisma Servo, kunlabore kun Monda Turismo (Pollando), eldonis sian kutiman kalendaron de Esperanto-renkontiĝoj.

(7) Kongresoj: Unuafoje en la lastaj 16 jaroj la IJK okazis ekster Eŭropo. Pli ol cent homoj el dudeko da landoj partoprenis la kongreson en Oaxtepec en Meksikio, inter la 10a kaj 17a de julio 1981. Kvankam tre kontentiga por la efektiva tutmondiĝo de TEJO, pluraj malglataĵoj ĝenetis la ĝuon de la kongreso. Ĉefaj inter ili estis la grava malfruiĝo de multaj programeroj kaj la tre alta kvanto de hispanlingvaj prezentoj. Sed la 37a IJK tamen memorindas pro la multaj novaj vizaĝoj, kiuj unuafoje vidiĝis en la ĉefa jara renkontiĝo de TEJO.

Progresis dum 1981 la preparlaboroj por la 38a IJK en Leuven (Belgio), en aŭgusto 1982. Tre kontentige evoluas la planoj por postaj IJKoj: diversaj landaj sekcioj esprimis intereson inviti la kongreson por estontaj jaroj.

(8) Eksteraj Rilatoj: La jaro 1981 vidis la refloradon de la eksteraj rilatoj de TEJO, kun novskala aktiveco diverskampa. TEJO kunlaboris en pluraj laborgrupoj de Kadro por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro, kaj ĉeestis la ĝeneralan kunsidon de Eŭropa Kunordiga Buroo de internaciaj junularaj organizaĵoj, al kiu TEJO decidis peti aliĝon. TEJO estis reprezentita ankaŭ en du sesioj de la Ĝeneva Neformala Kunveno de UN por internaciaj junularaj organizaĵoj, en kiu TEJO prenas aktivan rolon. Dum la jaro TEJO estis en daŭra kontakto kun Unesko, Internacia Unuiĝo de Studentoj kaj Monda Federacio de Demokrata Junularo.

Okazis du seminarioj de KER: la unua en junio en Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo, pri "Nova Internacia Ekonomia Ordo", kaj la dua en septembro, kunlabore kun Somera Universitato de Pikardio, en Lille, kun la temo "La rajtoj de lingvo kaj komunikado kiel homaj rajtoj".

Venis multaj informpetoj pro la katalogo de estontaj Esperantaj labortendaroj, kiun TEJO eldonis en la angla, franca, nederlanda kaj Esperanto.

(9) Informado kaj varbado: Dum la IJK okazis publika debato pri informado kaj varbado en landoj ekster Eŭropo, kun aktiva partopreno precipe de la meksikanoj. Anglalingva flugfolio pri TEJO estis eldonita. En oktobro TEJO kunlaboris kun UEA por okazigi komunan seminarion pri informado en la Centra Oficejo.

(10) Landa agado: Thomas Bormann prenis la gvidadon de ĉi tiu fako en la nova Estraro. Dum la jaro TEJO spertis la multecon de la junaj Esperanto-parolantoj ekster Eŭropo. La partoprenantoj de la IJK estis grandparte neeŭropaj. La Universala Kongreso estis vizitita de konsiderinda nombro da brazilaj gejunuloj. La kontaktoj kun Japanio kaj Koreo portis pliajn fruktojn, kaj regulaj informoj el tiu mondparto aperadis sur speciala "Orienta Paĝo" en *Koncize*. TEJO klopodas kompreni la diferencojn de agadmaniero en la diversaj mondopartoj kaj adapti siajn servojn kaj helpagadojn al malsamaj cirkonstancoj.

(11) Konkludo: En 1981 oni spertis malfermiĝon de TEJO: al aliaj junularaj organizaĵoj (strategio de eksteraj rilatoj) kaj al ĝis nun neglektitaj kontinentoj (kongreso kaj landa agado). Tutmondiĝo de TEJO ankoraŭ ne alvenis, sed TEJO nun konscias pli klare pri tiu fakto. Egaligo de la kontinenta emfazo fariĝis konkreta celo.

12. LANDA KAJ REGIONA AGADO

La fina parto de la ĉapitro pri landa kaj regiona agado de la pasintjara Estrara Raporto enhavis la jenan frazon: "Ĉi tiu tre konciza prezento de la 'farto' de la esperantlingva komunumo tra la mondo atingos sian celon, se la legantoj konsciiĝos pri la graveco de la loka kaj landa agado kaj trovos sian rolon en ĝi". Pluraj signoj montras, ke la agantoj por la Internacia Lingvo pli kaj pli konsciiĝadas pri loka kaj landa agado, kaj ke oni ekuzas la energion de la Movado por nia primara tasko, tio estas por la vastigo de la nombro de parolantoj de la Internacia Lingvo.

La gvidantoj de eŭropaj (kaj okcidentaj kaj orientaj) landaj asocioj pli kaj pli atente ellaboras planojn celantajn informi la ĝeneralan publikon, aŭ pli mallarĝe difinitajn partojn de ĝi, por elirigi siajn asociojn el la socia izoliteco kaj el la membronombra stagno. Ili ja sentas ke la nuna situacio ne estas kontentiga. Grandan agemon tiudirekte oni renkontis dum la pasinta jaro en Belgio, Francio kaj en ambaŭ germanaj ŝtatoj. En FR Germanio la movado ŝajnas retrovi siajn plej bonajn momentojn. En Germana DR oni sankciis la pligrandiĝon de la esperantistaro per nova pli alta organiza statuso. Reorganiziĝo okazis ankaŭ en Britio, kaj en Hispanio la nova estraro sukcesas stimuli aron da agadoj.

Ne eblas, tamen, silenti pri nepre plibonigendaj situacioj, kiel ekzemple en Aŭstrio. Zorgodona, pro aliaj kialoj, estas la stato de la movado en Pollando. Oni povas nur esperi, ke la lastatempaj eventoj ne havos tro

negativan influon al unu el niaj plej fortaj landaj asocioj.

La Universala Kongreso en Brazilo estis okazo por pluraj movadaj gvidantoj propraokule renkonti novan movadan "amason". La kvanto, kvalito kaj juneco de la brazilaj, kaj pli ĝenerale sudamerikaj, esperantistoj surprizis ĉiujn. Ilia "malproksimeco" de alikontinentaj esperantistoj tamen ekzistas, kaj UEA devas venki ĝin, se ĝi deziras meriti la epiteton "Universala" en sia nomo. Tiu salto ekster Eŭropo estas nun unu el niaj ĉefaj problemoj, ĉar dum ni trankvile kultivis nian eŭropan ĝardeneton, grandaj movadoj ekestis ne nur en Suda Ameriko sed ankaŭ en Azio, kiuj postulas pensadon pri iu Nova Esperantista Komunika Ordo en la **tutmonda movado.**

Antaŭe nekonata potencialo de la Movado en Sud-Ameriko: Esperantista dancensemblo de la Federacia Universitato de Alagoas entuziasmigis la kongresanojn en Brazilio.

Ankoraŭ pli forbarita restas la soveta esperantista "kontinento". Temas pri miloj kaj miloj da homoj, por kiuj oni ankoraŭ ne sukcesas trovi taŭgan kaj funkciantan organizan strukturon, kiu ebligus interŝanĝojn kaj amikecajn ligojn kun la cetera mondo.

Plisolidiĝis dum la pasinta jaro ankaŭ la tiel nomata "regiona agado", tio estas la agado celanta helpi izolitajn esperantistojn en landoj sen organizita movado. En Afriko anonckampanjo en kenja gazeto alvenigis al Roterdamo plurajn dekojn da informpetoj. Dank' al la laboro de areto da sindonaj homoj (ĉefe H. Bakker kaj Nino Vessella), ekestis vigla korespondado en la sŭahila kun la informpetintoj. Sekve, deko nun lernas la Internacian Lingvon. La kampanjo estos baldaŭ refarita kaj en kenjaj kaj en tanzaniaj gazetoj. Ankaŭ en Zairio io, tamen, moviĝas, dank'al surlokaj agantoj kunordigataj de K. Braet (Francio).

La plej impona sukceso en Azio estis la fondo de Federacio Esperanto de Bharato (Hinda Unio), okazinta komence de ĉi tiu jaro. Daŭris, krome, la laboro de K. Kikuŝima, por helpi izolitajn esperantistojn de sudaziaj landoj. Ekde nun ŝi estos helpata de Japana Esperanto-Instituto, kio montras, ke japanoj transprenas parton de la poresperanta laboro en la ĝenerala intereso.

Resume oni rajtas diri, ke 1981 estis jaro de reorientiĝo en la agado fare de pluraj landaj asocioj en Eŭropo kaj jaro de progreso ekster Eŭropo. Komence de la agado por festi la jubileon de la Internacia Lingvo ni disponas pri ĉiam pli firma bazo tra pluraj landoj kaj mondpartoj.

13. FAKA AGADO

La daŭra disvolviĝo kaj pliamasiĝo de la tutmonda Esperanto-movado pleje elstaras sur la kampo de la faka agado. En nia pasintjara Raporto ni menciis plurajn fakajn asociojn, kiuj havis aparte viglan laboron. Nun al tiuj pasintjaraj aldoniĝis kelkaj pliaj fakaj organizaĵoj de esperantistoj, tiel ke ni facile povas aserti, ke la jaro 1981 portis atentindajn sukcesojn sur ĉi tiu laborkampo.

Kiel bona ekzemplo trudiĝas la aktiveco de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kies 3a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco, en Ruse (Bulgario), arigis pli ol 200 partoprenantojn el 10 landoj. La Konferenco havis en la programo 43 fakajn kontribuaĵojn, kiuj nun aperis en aparta volumo sub la titolo *Sciencaj prelegoj*. Tiun eldonaĵon subtenis la bulgara Ministerio pri Sano pere de la landa UMEA-sekcio. Pluraj novaj sekcioj de UMEA estas fonditaj en diversaj landoj. Kelkaj havis apartajn laborkunvenojn, kiel ekz. la sekcio en Germana DR, kiu aparte emfazas la terminologian laboron en sia agado. Pro la sukceso de la ĝisnunaj tri konferencoj de UMEA, estas decidite, ke la 4a konferenco nomiĝu Kongreso de UMEA. *Medicina internacia revuo* aperas regule kaj estas unu el la plej bonaj fakaj periodaĵoj en Esperanto.

Multa laboro – ankaŭ kun emfazo pri la terminologio – ligiĝas al IFEF, faka organizaĵo de fervojistoj. Kiel kutime, ankaŭ en 1981 la fervojista kongreso en Regensburg (FR Germanio) viciĝis inter la plej grandaj movadaj kunvenoj. IFEF pasintjare eldonis ankaŭ la volumon *La verda relo; Beletra antologio pri la fervojo.*

Viglan laborjaron 1981 havis ankaŭ poŝtistoj (fondiĝo de nova grupo en Germana DR, renkontiĝoj en Leipzig kaj Budapeŝto, reprezentiĝo en internacia faka konferenco, eldonado de propra bulteno ktp); Muzika Esperanto-Ligo kompletigas sian fakan terminologion, eldonas la bultenon *Muziko* kaj partoprenigas siajn membrojn en solenaĵoj, turneoj kaj kongresoj. Ŝakistoj organizis korespondan turniron kun 27 teamoj el 16 landoj. Sukcesa ŝakturniro okazis ankaŭ dum la 66a UK en Brazilio. Skoltoj notis grandan informan efikon de sia aktiveco en la kadro de internacia tendaro (pli ol 18 000 partoprenantoj) en Norvegio. Reaktiviĝis kaj renovigis siajn kontraktojn kun UEA la fakaj organizaĵoj de ĵurnalistoj kaj filmistoj.

Apartan mencion meritas la granda laboro, kiu okazas sur la faka kampo en Ĉeĥoslovakio. Temas pri la konferencoj sub la nomo "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko". Tia faka konferenco en 1981 okazis en

Žilina kaj rezultigis 250-paĝan sciencan prelegaron diversteman. Ankaŭ por 1982 estas planita simila konferenco.

La ĉefa novaĵo sur la kampo de la faka agado en 1981 estas la fondiĝo de Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA pri Eldona kaj Sciencteknika Agadoj, inaŭgurita fine de marto. Multa laboro okazis tie dum 1981, kvankam tio ankoraŭ malfacile konstateblas fizike, ĉar ankoraŭ ne komencis aperadi libroforme la rezultoj de tiu laboro. La Movado sentos la gravecon kaj scios aprezi la valoron de Scienca Eldona Centro (tio estas ĝia mallonga nomo), kiam en 1982 kaj postaj jaroj komencos aperadi sciencaj kaj popularsciencaj verkoj, kiujn la Centro kompilas, tradukas, redaktas aŭ alimaniere prizorgas. La Centro laboras sub la gvido de prof. Ottó Haszpra, kun András Lukács kiel profesia kunordiganto.

Ankaŭ en Brazilio montriĝis, ke la Asembleo de Fakaj Asocioj estas utila forumo por interŝanĝi spertojn kaj ideojn. Tial simila kunveno estas planita en la kadro de la kongresa programo en Antverpeno. La ĉefa faka organizaĵo, Internacia Scienca Asocio Esperantista, ŝajnas sukcesi en siaj klopodoj venki diversajn administrajn kaj organizajn problemojn, kiuj malhelpis la aperadon de *Scienca revuo* tra pluraj lastaj jaroj. En 1981 la revuo reaperis kaj nun provas ĝisdatigi siajn jarkolektojn.

La Komisiono pri Virina Agado starigis grupon de kunlaborantoj el plej diversaj landoj, por helpi ĝin en la plenumo de taskoj. La unua praktika utiligo de tiuj kontaktoj okazis en julio 1981, kiam ili helpis en la urĝa distribuado de Esperant-lingva demandilo pri la vivo de virinoj tra la mondo por la japana ĵurnalo *Mainiti simbun*. Kelkaj el la kunlaborantoj mem tre aktive laboris je landa nivelo, precipe en Brazilo (kie oni organizis virinan programon por la UK), Bulgario, Estonio (Soveta Unio) kaj Svedio.

14. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Ĉiuflanke oni rimarkas intensiĝon de la studado de esperantologio kaj interlingvistiko, per konferencoj en diversaj partoj de la mondo, per artikoloj en fakaj revuoj, per novaj eldonaĵoj, per apartaj esplorprojektoj, doktoraj disertacioj ktp. La ĉefa tasko de UEA estas kunordigi kaj plifortigi tiun agadon, kaj gvidi ĝin laŭ plej utilaj direktoj por la Esperanto-movado. Dum 1981 ĝi faris tion precipe per tri vojoj: aperigo de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (LPLP), organizado de la ĉiujara Esperantologia Konferenco en la kadro de la UK, kaj aperigo de *Esperanto-dokumentoj*. LPLP aperis regule tra la jaro, kaj nun havas pli da abonantoj ol iam ajn antaŭe. Ĉiuj ĉefaj esplorbibliotekoj kaj multaj unuopaj sciencistoj nun abonas ĝin. Sed ĉefe necesas fortigi du flankojn de LPLP: la emfazo je artikoloj kiuj rilatas al la studado de lingvaj problemoj je internacia nivelo aŭ de Esperanto, kaj emfazo je artikoloj en aliaj lingvoj ol la angla. Redaktas prof. R. Wood.

La 4a Esperantologia Konferenco en Brazilio bone sukcesis. En tri tamen iom improvizitaj sesioj, ĝi traktis la Lingvon, la Movadon, kaj la Literaturon. Multnombraj aŭskultantoj aŭdis kontribuojn de pluraj konataj esperantologoj.

Dum la jaro aperis 12 *Esperanto-dokumentoj* en la angla, franca aŭ Esperanto. Inter ili estis Esperanta gvidilo al la ĉefaj esplorcentroj pri interlingvistiko, anglaj kaj francaj tradukoj de la nova statuto de UEA, kaj broŝuro de la rezolucioj de la UK de 1980. Estis reeldonita la tre ŝatata studo de Piron *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* kiu baldaŭ aperos ankaŭ en la anglalingva serio de *Esperanto-dokumentoj* kaj jam eldoniĝis en kelkaj aliaj lingvoj.

Multiĝas altnivelaj nacilingvaj studoj pri Esperanto: En 1981 aperis germanlingva verko de D. Blanke, sekvis franclingva disertacio de F. Lo Jacomo, kaj ĵus aperis la impona sociologia studo de P.G. Forster en la angla lingvo.

15. FINAJ VORTOJ

La jaro 1981 pro pluraj kialoj estas signifa jaro por UEA kaj por la Movado ĝenerale. Ni menciu la malfermon de nova oficejo en Budapeŝto. Tio montras, ke la malcentrigo de la UEA-laboro estas sisteme daŭrigata. Eĉ pli grava estas, ke la Asocio unuafoje sukcesis okazigi sian kongreson en la suda hemisfero, en Latin-Ameriko. La spertoj de la 66a Universala Kongreso montras, ke la Movado havas rimarkindajn fortojn en Sud-Ameriko. La rezultoj de tiu Kongreso devas nin kuraĝigi por pli ofte aranĝi la plej gravan Esperanto-eventon ekster Eŭropo. Tio estas la plej efika rimedo ne nur por ligi la ekstereŭropajn esperantistojn al UEA, sed ankaŭ por unuigi la movadajn fortojn tutmonde. La rekorda membronombro de la Asocio tutcerte havas rektan rilaton al la 66a UK. Tamen, ni ne trotaksu tiun atingon, ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis trarompi plurajn aliajn barojn – kiel ekzemple la transpagaj problemoj –, kiuj malhelpas eblan grandskalan vastiĝon kaj rapidan evoluon de UEA. Kvankam la mondaj cirkonstancoj ne estas la plej favoraj por la antaŭenigo de la Movado, ni devas strebi, por trovi ankoraŭ neeluzitajn eblecojn, kiel ni sukcesis en 1981 sur pluraj kampoj.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
BUĜETO KAJ SPEZOKONTO
POR LA JARO 1981

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Salajroj, malnete	263 100	263 659,35
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	53 200	51 514,71
Minus kompensoj pro malsano	–	- 6 988,27
Salajroj, nete	**316 300**	**308 185,79**
Afranko kaj telefono, nete	23 400	24 964,86
Presaĵoj	10 100	10 757,28
Materialoj	9 700	7 714,48
Riparo (prizorgo) de maŝinoj	7 000	5 681,89
Trinkaĵoj	1 300	905,93
Revizoro + administraj kostoj	1 500	1 122,08
Ĝenerala helpo GCA al CO	–	2 325,90
Centra Oficejo, nete	**53 000**	**53 472,42**
Fotokopiado	6 000	4 796,53
Minus vendoj kaj kompensoj	- 2 500	- 2 300,74
Fotokopiado, nete . . .	**3 500**	**2 495,79**
Gaso, elektro, akvo . . .	6 300	9 171,92
Riparo de la domo . . .	3 000	751,57
Purigiloj, fenestropurigado	1 200	736,18
Asekuroj	1 400	2 185,93
Impostoj je la domo . . .	2 200	2 247,26
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 1 900	- 1 701,82
Oficeja domo, nete	**12 200**	**13 391,04**
Preskostoj de "Esperanto"	34 600	38 378,25
Sendokostoj	37 700	52 017,52
Kovertoj	2 200	2 344,00
Grafiko ktp.	32 000	33 863,16
Ekspedlaboro ĉe GCA . .	–	9 819,66
Minus anoncoj	-14 800	-15 945,36
"Esperanto", nete	**91 700**	**120 477,23**
Preskostoj de la Jarlibro	17 900	18 427,00
Sendokostoj	12 700	14 682,25
Kovertoj	1 100	1 232,78
Grafiko	12 900	12 544,00
Admin., ekspedlaboro GCA	–	1 487,23
Minus anoncoj	-11 000	-11 238,34
Jarlibro, nete	**33 600**	**37 134,92**
Preskostoj "Kontakto"	6 800	6 245,12
Sendokostoj	3 600	4 057,30
Kovertoj	300	596,81
Grafiko, ekspedlaboro ktp.	8 000	7 524,49
Minus anoncoj	- 200	- 15,51
"Kontakto", nete . . .	**18 500**	**18 408,21**
"Koncize"	**–**	**2 100,00**
Veturkostoj oficejaj . . .	4 400	4 811,63
Vojaĝkostoj kongresaj . .	16 400	21 423,41
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	10 500	13 119,46
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	1 900	1 900,00
Reprezentaj kostoj . . .	2 000	1 701,50
Komisionoj kaj komisiitoj	2 000	–
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	**37 200**	**42 956,00**
Volontula Servo	**15 300**	**10 403,54**
Korespondo, Estraro de UEA	–	6 439,98
Korespondo, Estraro de TEJO	–	1 402,06
Korespondo, komisiitoj	–	601,98
Korespondo estrara k.a., entute	**7 200**	**8 444,02**
Bankkostoj (i.a. valorpaperaj)	1 800	3 994,57
Kurzperdoj	5 000	7 016,21
Regulaj donacoj al oficistoj	6 200	3 856,00
Belartaj konkursoj, premioj		2 081,04
Aliaj donacoj kaj premioj		208,00
Postpagitaj kaj diversaj kostoj	1 400	827,48
Rezervo por dubindaj debitoroj	–	1 554,22
Ĝeneralaj kostoj, entute	**14 400**	**19 537,52**
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 300	1 300,00
Deprezo de maŝinoj ktp. 10%	22 600	3 566,31
Deprezo de komputilo 12,5%		8 553,88
Deprezo programoj k.a. 20%		14 379,62
Deprezoj, entute	**23 900**	**27 799,81**
Pozitiva saldo	**–**	**6 223,51**
Sumo de la kostoj . . .	**626 800**	**671 029,80**

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj MJ	21 600	27 714,61
Kotizoj MA	201 300	217 133,71
Kotizoj MJ-K	2 700	3 440,77
Kotizoj MA-K	9 200	12 272,92
Kotizoj, individuaj membroj	234 800	260 562,01
Aligitaj membroj UEA . .	19 400	22 627,14
Aligitaj membroj TEJO . .	6 900	7 948,62
Simplaj abonoj de "Esperanto"	6 400	10 110,53
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	22 000	22 466,31
Kongresaj abonoj "Esperanto"	9 300	3 719,00
Abonoj kaj vendoj "Kontakto"	4 500	5 437,60
Kolektivaj abonoj "Kontakto"	1 400	602,00
Societo Zamenhof . . .	24 800	24 641,61
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 400	2 081,37
Kotizoj, entute	**330 900**	**360 196,19**
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	**14 000**	**17 226,30**
Vendoj de la Libroservo	202 000	241 291,03
Minus kostoj de la varoj	-132 400	-164 319,44
Minus rojaltoj	- 5 700	- 9 984,37
Minus katalogaj kostoj . .	- 13 900	- 12 026,77
Minus aliaj kostoj . . .	- 300	- 340,96
Kongresa libroservo . . .	–	4 618,19
Triono de la sendokostoj	5 900	7 129,63
Libroservo, nete	**55 600**	**66 367,31**
Abonoj je nepropraj gazetoj	7 800	12 732,59
Minus kostoj de la abonoj	- 5 100	- 9 447,28
Abonservo, nete	**2 700**	**3 285,31**
Grafikaj laboroj GCA+ CO	238 000	247 632,30
Minus kostoj	-160 400	-201 441,62
Grafiko, nete	**77 600**	**46 190,68**

Nov-Jorka Oficejo . . .	35 000	73 147,19
Minus kostoj	-48 600	-40 175,89
Minus saldtransporto al 1982	-13 600	-32 971,30
Nov-Jorka Oficejo, nete. .	**–**	**0,00**
Subvencio al SEC Budapeŝto	–	6 818,74
Minus kostoj de SEC . .	–	- 6 818,74
Budapeŝta Oficejo, nete .	**–**	**0,00**
20% de kotizoj 66a UK . .	28 300	26 370,71
50% de licencpago IJK (takso)	1 000	1 350,00
Kongresoj, entute . . .	**29 300**	**27 720,71**
Turismaj aranĝoj	**10 000**	**15 093,35**
Rento ricevita	41 400	59 409,95
Rento pagita (inkl. deponoj)	- 2 400	- 5 547,05
Rento, nete	**39 000**	**53 862,90**
Kurzgajnoj	2 600	8 094,75
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	4 700	2 394,20
Postricevitaj kaj div. rimedoj	1 400	3 725,44
Ĝeneralaj rimedoj, entute	**8 700**	**14 214,39**
De inventaro pro programado	46 000	47 688,12
De kapitalo dumvivaj membroj	12 500	12 335,42
De TEJO/KER pro volontulo	–	3 829,12
De Inst. Hodler pro administro	500	2 120,00
De Prop. Konto pro seminario	–	900,00
Kompensoj, entute . . .	**59 000**	**66 872,66**
Sumo de la rimedoj . . .	**626 800**	**671 029,80**

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
BILANCO JE LA 31a DE DECEMBRO 1981
(Por faciligi komparon kun la antaŭa jaro, el la maldekstra kolumno aperas la stato fine de 1980)

AKTIVOJ	**1980**	**1981**
Kurantaj bankkontoj.	23 987,16	24 857,40
Bankaj ŝparkontoj . .	134 552,32	75 000,00
Poŝtĉekkontoj	47 065,57	50 575,65
Kasoj, respondkuponoj	1 604,93	1 763,90
Sumoj transpagataj . .	4 947,84	- 1 235,46
Monrimedoj entute . .	**212 157,82**	**150 961,49**
Valorpaperoj	**278 185,00**	**272 234,00**
Ricevotaj rimedoj . .	**17 279,75**	**93 985,69**
Antaŭpagitaj kostoj . .	**67 272,88**	**21 674,69**
Debitoroj	**156 204,25**	**228 707,20**
Institucio Hodler '68 .	**115 772,85**	**154 589,35**
Provizoj libroservaj . .	152 957,24	178 844,36
Presaĵoj, materialoj ks. .	52 229,59	46 624,08
Provizoj entute . . .	**205 186,83**	**225 468,44**
Maŝinoj ktp. Roterdamo	21 853,84	126 383,18
Maŝinoj ktp. Antverpeno	35 002,80	108 885,04
Maŝinoj ktp. Nov-Jorko	1 258,94	1 113,54
Maŝinoj ktp, entute . .	**58 115,58**	**236 381,76**
Garantiaj sumoj . . .	**20 942,78**	**43 955,03**
Domo en Roterdamo	**125 100,00**	**123 800,00**
Tereno Aspremont . .	**1,00**	**1,00**
Sumo de la aktivoj . .	**1 256 218,74**	**1 551 758,65**

PASIVOJ	**1980**	**1981**
Rezervo libroserva . .	15 000,00	15 000,00
Rezervo por domrenovigo	536,43	15 536,43
Rezervo por debitoroj	–	1 554,22
Rezervoj entute . . .	**15 536,43**	**32 090,65**
Antaŭricevitaj rimedoj .	**107 418,93**	**160 692,41**
Pagotaj kostoj	**38 022,14**	**129 244,66**
Kreditoroj	**303 240,32**	**393 603,17**
Ŝparkontoj de membroj	**63 578,68**	**111 162,98**
Fondaĵo Azio-Afriko	8 262,92	6 874,76
Fondaĵo Evolulandoj	4 103,20	600,00
Fondaĵo Canuto . . .	674,73	773,50
Fondaĵo EKI	13 286,54	15 057,74
Fondaĵo Enciklopedio	1 266,27	1 899,47
Eldona Fondaĵo . . .	8 886,30	8 916,30
Financa Programo . .	31 136,17	26 444,17
Kongresa Rez. Fondaĵo	34 442,78	32 709,17
Fondaĵo Oficeja Ilaro	3 397,59	–
Premio Jozefo Petrin	417,49	357,23
Propaganda Konto . .	46 391,17	35 803,92
Fondaĵo Scienco k Tekniko	9 989,55	4 395,41
Fondaĵo TEJO . . .	22 952,11	24 694,56
Fondaĵo TEJO (KER)	6 522,60	12 095,39
Rezerva Fondaĵo IJK	–	2 646,50
Fondaĵo UN/Unesko	6 998,59	545,21
Fondaĵoj entute . . .	**198 728,01**	**173 813,33**
Kapitalo DM	322 804,69	334 925,68
Cetera kapitalo . . .	206 889,54	216 225,77
Asocia kapitalo entute	**529 694,23**	**551 151,45**
Sumo de la pasivoj	**1 256 218,74**	**1 551 758,65**

RIMARKO: Montriĝis, bedaŭrinde, ke la buĝetpropono por la jaro 1983 ankoraŭ ne estis fintraktita je la momento de la finredakto de ĉi tiu revunumero. Tial ĝi aperos en unu el niaj venontaj numeroj. Simile estas pri la raportoj de la komitataj kaj profesia revizoroj. Mankas ankaŭ la finkalkulo de la spezoj de la 66a Universala Kongreso en Brazilio. Tamen, tiuj kongresaj spezoj, kiuj rekte influas la financajn rezultojn de UEA en la pasinta jaro, jam estas en la ĉi-apudaj superrigardoj, eĉ se foje nur kiel fidindaj taksoj (ekz. licencpago IJK).

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
JULIO 1982
ANTWERPEN

La legenda heroo Brabo ĵetas manon de giganto por doni nomon al la urbo de la 67a UK. Nia glumarko aperis pli malfrue ol kutime sed kompense kostas pli malmulte: po 6,00 (por Nederlando 6,86) guldenoj por cent brilarĝentaj memgluaj markoj sur vakspapero, inkluzive sendokostojn. Mendu!

Loke

Ĉinio

• Unu el la lastaj numeroj de *El Popola Ĉinio* konfirmas, ke oni nuntempe amase lernas Esperanton en Ĉinio. Jen nekompleta listo de la Esperanto-kursoj en diversaj ĉinaj urboj kaj provincoj: Yunnan (160 kursanoj), Luizhi (100), Ŝanhajo (190), Hefei (120), Wuxi (200), Baoqing, Zhenjiang, Xi'an, Kantono, Hangzhou ktp.

• En la unua ĉi-jara numero de la ĉina revuo *Moderna eksterlanda literaturo* aperis ampleksa prezento de la literaturo en Esperanto. La artikolon verkis s-ro Ye Junjian, konata ĉina verkisto kaj esperantisto, kiu mem kontribuis al la Esperanta beletro sub la pseŭdonimo Cicio Mar.

Ebura Bordo

• Lastatempe komencis kreiĝi movada kerno en tiu okcidentafrika lando. Inter pluraj homoj, kiuj petis informojn pri Esperanto, du jam bone progresis en la lernado kaj ligis plurajn korespondajn kontaktojn, i.a. kun la respondeculoj pri la regiona agado de UEA. Temas pri du agrikulturaj inĝenieroj, kiuj siatempe studis en Jugoslavio kaj tie unuafoje konatiĝis kun Esperanto. Ili ambaŭ bonvenigus konvenajn legaĵojn en Esperanto. La adresoj estas: Hyacinthe Séka, 03-B.P. 572, Abidjan 03, Ebura Bordo; kaj: Gnanon Zié, B.P. 384, San Pédro, Ebura Bordo.

Svedio

• Ankaŭ ĉi-jare Klubo Esperantista de Malmö partoprenos per informa budo kaj ekspozicio pri Esperanto en Skania Foiro. Temas pri tradicia kaj tre populara aranĝo, kiu ĉi-jare okazos por la 64a fojo (inter la 20a kaj 29a de aŭgusto) en tiu sudsveda urbo.

Kanado

• Ĉe la urba kolegio de Granby, en aprilo ĉi-jare Normand Fleury organizis informan standon pri Esperanto. Al multaj interesitoj oni disdonis i.a. la unuan lecionon de franclingva koresponda E-kurso, kiun gvidas branĉo de la Informa Fako de Kanada Esperanto-Asocio en Ŝerbruko (Kebekio). Fleury estis ankaŭ intervjuita pri Esperanto en la loka gazeto.

• **Argentino: De la 2a ĝis la 19a de aprilo okazis en Buenos Aires grava internacia libro-foiro, vizitita de ĉ. 700 000 homoj. Tie, en tre konvena loko, staris informa ekspozicio pri Esperanto, ĉe kiu oni ankaŭ vendis E-lernolibrojn. Tamen, la ĉefa celo de la standon, organizita de la junulara fako de Esperanto-Asocio de Buenos Aires, estis informado pri Esperanto. Disdoniĝis pluraj dekmiloj da informiloj. Temas pri la plej sukcesa varbagado ĝis nun en Argentino.**

FR Germanio

• Esperanto-Klubo de Munkeno apartenas al la plej aktivaj en la lando. Preskaŭ du kvinonoj de la kluba membraro (121 membroj en 1981) estas gejunuloj. La Klubon antaŭ nelonge vizitis la ĉina esperantisto prof. Ye (sur la foto), kiu restados du jarojn en la ĉefurbo de Bavario, kiel gastprofesoro pri la ĉina lingvo en la Universitato de Munkeno. Prof. Ye venas de la Universitato en Nanking (Ĉinio), kie li rolis kiel vicprezidanto de la Universitato kaj instruis i.a. la Internacian Lingvon.

Hispanio

• Laŭ peto de Hispana Fervojista Esperanto-Asocio, la nacia fervojo de Hispanio decidis eldoni ankaŭ en Esperanto informan broŝureton pri la fervojaj servoj okaze de la Monda Ĉampionec-Konkuro en Futbalo (junio kaj julio, en diversaj hispanaj urboj). Lige al la sama sporta evento, en marto ĉi-jare komenciĝis intensa Esperanto-kurso por interpretistoj, kiuj dum la futbala grandspektaklo deĵoros en la centra stacidomo de la kataluna ĉefurbo Barcelono. Kiel ni jam informis en niaj antaŭaj numeroj, en Barcelono funkcias speciala informcentro por la esperantistoj, kiuj planas viziti Hispanion en la tempo de la Ĉampionec-Konkuro.

Fake

Lingva problemo

• Kelkaj movadaj periodaĵoj rapidis pasintmonate disheroldi "grandan novaĵon", laŭ kiu Eŭropa Komunumo ekuzos Esperanton kiel pontolingvon por siaj tradukbezonoj. Tiu informo fontis el danlandaj amaskomunikiloj, kaj baziĝis sur efektivaj planoj de la dana firmao Rovsing kaj la nederlanda entrepreno BSO doni tian rolon al Esperanto, se Eŭropa Komunumo konsentos financi la projekton. Nia revuo ne volis rapidi rilate tiun novaĵon antaŭ ol certiĝi pri pluraj neklaraj aspektoj de la informo. Tamen, ankaŭ nun, monaton pli poste, ne eblas multon alian diri pri la afero. Ni ne scias kiel evoluos la projekto de la du firmaoj. Kion ni ja scias estas, ke antaŭ ol similaj projektoj efektiviĝu, necesas engaĝi duonon de la Esperantomovado por kunlabori, ĉar oni ne povas atendi, ke la kapablojn de la Internacia Lingvo pli kompetente juĝos kaj eluzos neesperantistoj, kiel ajn renomaj sur sia faka kampo ili estas.

Radio

• Kiel ni anoncis en nia aprila numero, rekomenciĝis Esperanto-elsendoj de Pola Radio. Nun ili okazas kvinfoje tage anstataŭ trifoje kiel antaŭe. La duonhoraj elsendoj komenciĝas je la sekvantaj horoj laŭ la Greniĉa Meza Tempo: 05h30, 11h00, 16h30, 19h30 kaj 21h30. Pri aldonaj ondolongoj ni informos en nia junia numero, kie aperos la kompleta tabelo pri la radioelsendoj en Esperanto.

Virinoj

• La 13an de aprilo, en la Nov-Jorka Oficejo de UEA okazis prelego por kvardeko da membroj de Ligo de Virinoj de UN, organizaĵo por la edzinoj de UN-stabanoj. La tre bone akceptitan prelegon pri "Esperanto, komunikado kaj UN" faris d-ro Humphrey Tonkin, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj.

Instruistoj

• Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) montras kuraĝon en la elektado de la lokoj por siaj jaraj konferencoj. En 1980 ILEI aranĝis sukcesan konferencon en Malto, kaj kelkajn jarojn pli frue, la faka organizaĵo de la movadaj instruistoj sondis eblecojn konferenci en Madagaskaro. Nun venas informo, ke la 17a Internacia Konferenco de ILEI okazos venontjare en Sintra (Portugalio), inter la 14a kaj 22a de julio 1983. Tio estas la rezulto de la vizito, kiun meze de aprilo ĉi-jare al Portugala Esperanto-Asocio faris d-ro Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de ILEI, kaj lia fratino, d-rino Catina Dazzini, kiu estras la italan sekcion de ILEI. La ĉi-jara konferenco okazos inter la 15a kaj 24a de junio (vidu en nia marta n-ro, p.51) en Italio.

Lernolibroj

• *Jen nia mondo,* dukajera lernolibro de d-ro J.C. Wells, kun entute 10 kasetoj akompane, fariĝas ĉiam pli populara kaj internacie uzata. Al la anglalingva originalo, kiu aperis en 1979, baldaŭ aldoniĝos sveda eldono, preparita de Anita Lindblom kaj Sten Öfors. Se ni ne eraras, tio estas jam la tria traduko de *Jen nia mondo*, kiu antaŭe aperis en la islanda kaj itala lingvoj. Alia populara lernilo ŝajnas esti *Esperanto-lernolibro,* eldonita de Internacia Kultura Servo (Jugoslavio), kiu pasintjare aperis en la franca, kaj ĉi-jare en la **germana.**

• **Interlingvistiko: La 19an de marto 1982, doktoriĝis en la Budapeŝta Universitato f-ino Zsuzsa Varga-Haszonits pri la temo "La t.n. 'naturalisma skolo' en interlingvistiko; Kritika analizo". Ŝi estas la kvara doktoriĝinto el la esperantologia fako de prof. Szerdahelyi.**

Persone

Tyblewski

• D-ro Tyburcjusz Tyblewski, konata pola esperantisto, kiu ĵus eldonis 134-paĝan volumon da originalaj kaj tradukaj beletraĵoj (*El la valo*; 16,20 gld), prelegvojaĝas dum majo, junio kaj julio tra Nederlando, Belgio, Francio kaj FR Germanio.

Szerdahelyi

• Prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, estro de la esperantologia fako en la Universitato ELTE en Budapeŝto, estis la ĉefa gastpreleganto en la ĉi-jara kongreso de Sveda Esperanto-Federacio, inter la 14a kaj 16a de majo en Nyköping. Tio estas facile komprenebla, se oni scias, ke la ĉeftemo de la kongreso estis "Esperanto en la lernejo", kampo sur kiu prof. Szerdahelyi estas la plej elstara laboranto dum la lastaj du jardekoj. La

gastigantoj 1982

APERIS, ĵus, la ĉi-jara kajero de la Pasporta Servo de TEJO. Ĝi estas 36-paĝa, kaj enhavas 477 adresojn en 48 landoj. La "Listo de gastigantoj 1982" – tiel ĝi nomiĝas – estas akirebla ĉe: Jeanne-Marie Cash, 5 allée des Félibres, F-31520 Ramonville St. Agne, Francio. La prezon de 32,00 francaj frankoj (aŭ egalvaloro) oni pagu al la poŝtĉekkonto 25426-58 Paris. La kajero estas aĉetebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 13,80 guldenoj. Bonan vojaĝon!

budapeŝta lingvisto faris en Svedio vizitojn al la samfakanoj en la universitatoj de Stokholmo kaj Uppsala, kaj estis intervjuita de sveda gazetaro. Cetere, antaŭ plenaj tri jaroj (vidu nian numeron de majo 1979) TK/Stafeto anoncis, ke "post kelkaj monatoj" aperos 700-paĝa volumo *Interlingvistiko* de Szerdahelyi. Kiel vi scias, la libro ankoraŭ ne aperis. Je nia demando, kiam tio okazos, ni eksciis, ke la eldonejo ne rezignis pri la projekto, kaj ke la libro efektive pretiĝas – nun grafike – kaj estas atendebla fine de ĉi tiu jaro aŭ komence de 1983.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ estas la sola movada serio destinita unuavice por la informado de nemovada publiko. Ĝis nun aperis trideko da kajeroj en la angla, 15 en Esperanto, kaj 10 en la franca. Pro la ampleksiĝo de la preparaj laboroj, por pli efike serĉi novajn temojn kaj aŭtorojn, por siavice intensigi kaj rapidigi la aperritmon de la serio, UEA decidis serĉi apartan

REDAKTORON DE "ESPERANTO-DOKUMENTOJ"

Se vi havas bonan konon de la lingvo kaj Movado, se vi disponas pri iom da spertoj en la sfero de esploroj kaj dokumentado kaj se vi pretas helpi al UEA ĉi-maniere, petu pliajn detalojn de: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono.

Oficiala Informilo

N-ro 553

KIAM APEROS LA JARLIBRO?

Pro la aŭtomatigo de la Centra Oficejo, pro la neceso unuafoje meti en la komputilon la tutan enhavon de la Jarlibro kaj krei konvenajn komputilajn programojn tiucelajn, la ĉijara Jarlibro grave malfruos kaj ne aperos signife antaŭ la Kongreso.

TRI NOVAJ KOTIZPERANTOJ

Post multjara dankinda kotizperado por UEA, ĉesas funkcii en tiu rolo f-ino A. Orsolini (Luksemburgo), s-ro O'Reilly (Irlando) kaj s-ro Zeballos-Morales (Urugvajo), ĉefdelegito de post 1947! F-ino Orsolini kompreneble restas ĉefdelegito por Belgio. La novaj kotizperantoj en la menciitaj landoj estas: **Luksemburga Esperanto-Asocio**, 1 rue de Kehlen, L-8394 Olm, Luksemburgo (poŝtĉekkonto Luxembourg 8936-12); **Esperanto-Asocio de Irlando**, 9 Templeogue Wood, Templeogue, Dublin 12, Irlando; **inĝ. Alberto Barrocas**, Casilla de Correo 1040, Montevideo, Urugvajo.

BANKA KONTO EN HINDA UNIO

Hindaj esperantistoj nun povas pagi kotizojn, abonojn kaj libromendojn al la nova bankkonto de UEA en tiu lando, per sendo de ĉeko al: Universala Esperanto-Asocio, Non-Resident C/D, Account No-U-1, United Bank of India, International Banking Branch, 4 Fairlie Pl., Calcutta 700 001. Samtempe necesas informi la Centran Oficejon de UEA pri la dato, sumo kaj celo de la pago. UEA-kotizoj en hindaj rupioj estas jenaj: MJ(-K) 48, MA(-K) 120, SA 72, Kto 36.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Usono: Arnold Victor.

SOCIETO ZAMENHOF 1982

Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Italio: Clara Gubbioli Carioli. Norvegio: Margrete Landmark. Usono: Gertrude Novak. Jugoslavio: Emilija Lapenna. Svedio: Erik Carlén.

Entute ĝis nun 176 membroj.

DONACOJ 1982 (Gld.) ĝis la 31-a de marto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Britio: B. Phillips 32,79. Nikaragvo: J. Regal 24,08. Sumo ĉi-jara 111,29.
FONDAĴO CANUTO: Usono: S. Culbert 235,45. Sumo ĉi-jara: 632,36.
FONDAĴO TEJO: Diversaj malgrandaj 4,72. Sumo ĉi-jara 6,22.
FONDAĴO KER DE TEJO: Anonima 99,15.
ĜENERALA KASO: FR Germanio: H. Wiegand 11,08. Nederlando: J.Th. Fischer 17,50. Norvegio: A. Flach 17,38. Diversaj malgrandaj 9,10. Sumo ĉi-jara 636,26.
PATRONOJ DE TEJO: 41 Margrete Landmark, Norvegio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

JOHN FRANCIS en la lastaj tri jardekoj zorgis (aŭ kunzorgis) pri kvar gravaj verkoj de la Esperanta literaturo: Unue venis la jam legendiĝinta *Kvaropo* en 1952, poste sekvis *Vitralo* (en 1960), kiun multaj konsideras la plej bona originala novelaro en Esperanto, tiam en 1978 venis la 600-paĝa romanego *La granda kaldrono*, kiu rapide elĉerpiĝis. Nun aperis la kvara libro de Francis, romano denove, sciencfikcia: **Misio sen alveno**, J. Francis (1924 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 159p. 21cm. ISBN 90 6336 021 5. Prezo: 24,00 guldenoj (420 belgaj frankoj), plus sendokostoj.

JOHN FRANCIS

MISIO SEN ALVENO

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Por povi verki biografion pri Andreo Cseh mi bezonas liajn korespondaĵojn de antaŭ 1940. Antaŭdankon pro alsendo. E. Borsboom, Sanderuslaan 20, 3732 ET De Bilt, Nederlando.

32-jara muzik-instruisto deziras korespondi kun gejunuloj tutmonde: s-ro Miĥail G. Banovski, 4144 v. Borec-Plovdiv, Bulgario.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Ankaŭ vi povas helpi al netranspagipovaj blinduloj partopreni en la jubilea 50a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, inter la 31a kaj la 7a de aŭgusto ĉi-jare, en Breda (Nederlando). Aĉetu la belan kongresan glumarkon (aperos en junio) ĉe: R. Moerbeek, v. Speykstr. 28, 3014 VL Rotterdam. Prezo: cent glumarkoj por 6,00 guldenoj. Afranko inkluzivita.

Hispana 9-jara knabino deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun samaĝaj infanoj el la tuta mondo: Montserrat Illa, str. Escultors Rubió, s/n, Moià (Barcelona), Hispanio.

Germana komencanto (de ĉi tiu jaro), 33-jara, gimnazia instruisto pri biologio kaj kemio, ĉefhobio magio (arto de amuza ŝajnigado), ŝatus korespondi por perfektigi sian lingvoscion kaj skribe diskuti pri ĉio ajn: Horst Paffen, Alfred-Delp-Str. 12, D-4019 Monheim, FR Germanio.

S.M. Ujdur, plumnomo M. Cendo: Mortis en Nov-Zelando en 1953. La nevo de ĉi tiu malnova esperantisto kompilas historion de sia onklo por jugoslava muzeo starigota en Nov-Zelando. Ĉar la onklo multe korespondis inter esperantistoj, li nun serĉas leterojn, fotojn kaj ĉiajn informojn rilate lin. Iuj kiuj povos helpi, bonvole sciigu al: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 330, Wellington, Nov-Zelando.

Pri helpo al handikapuloj interŝanĝi spertojn deziras 26-jara instruisto: s-ro K.K. Sulaiman, Rahmania School for Handicapped, P.O. Medical College, Calicut 8, Kerala 673008, Hinda Unio.

Kun gejunuloj volas korespondi kaj interŝanĝi revuojn kaj poŝtmarkojn 19-jara ĉiliano: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Ĉilio.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Per sonbendoj kaj kasetoj volas korespondi blinda nederlanda esperantisto: s-ro H. van der Pas, Cliostraat 5, 5631 HA Eindhoven, Nederlando.

28-jara instruistino pri la franca volas korespondi pri literaturo, muziko ktp. Skribu al: f-ino Nguyễn Thi Phuong Thảo, 177/54 Ngô Tùng Châu – Quân Bình Thanh, TP. Hô Chí Minh, Vjetnamio.

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblas ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk. 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr. Kasedo: 20 sv. fr. Vendas ankaŭ UEA.

Ĉiam kaj konstante akceptas korespondproponojn kun japanoj: Japana Esperanto-Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Trans la sonizolan muron – komuniku kun surduloj kaj surdblinduloj: Jen tria libreto pri kontaktoj kun handikapuloj, 36-paĝa, ilustrita. Aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 2,70 gld.

Kun montgrimpantoj ŝatus kontakti s-ro Roman Jaroszyk, ul. Szarych Szeregów 6/16, PL-65-538 Zielona Góra, Pollando.

Pentristo deziras interŝanĝi oleopentraĵojn (pri pejzaĝoj): Freddo Bosmans, 21 rue de Comblain, B-4183 Ferrières, Belgio.

Vi estas 18–22-jara komencantino/progresantino, vivas ie ajn en la mondo, kaj interesiĝas pri fondo de familio internacia, en kiu Esperanto estos uzata? Ankaŭ mi havas tiun intencon. Skribu al mi: s-ro Stefano Keller, Entrebois 59, CH-1018 Lausanne, Svislando.

Mi lernas Esperanton, ĉar mi volas trovi amikojn en ĉiuj landoj. Mi estas 18-jara gimnazianino: Klara Natki, Killian út. 8, H-8154 Polgárdi, Hungario. Mi antaŭĝojas pri via letero!

18-jara gimnazianino ŝatus korespondi pri poezio kaj muziko: Małgorzata Bujak, ul. Katowicka 8, PL-42-263 Wrzósowa k/Częstochowy, Pollando.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

De la 1-a ĝis la 14-a de Aŭgusto
la ESPERANTO DOMO
KASTELO GRESILLON
proponas al vi:

"SEMINARIO pri REKTMETODA INSTRUADO de ESPERANTO" sub la gvido de s-ino CHILDS-MEE

PRELEGOJ DIVERSTEMAJ

petu informilojn de:
Franca Esperantista
Kulturdomo
Kastelo GRESILLON
49150 BAUGE Francio

Filatelistoj!

Se vi ne aliĝis al la ĉi-jara UK, vi eble ne scias pri la kongresaj filatelaĵoj, kiujn vi povas mendi:

Kongresa poŝtmarko, nestampita	**Gld. 0,75**
Kongresa poŝtmarko, stampita	**0,75**
Unuataga koverto kun bildo de akvoputo kaj kongresa poŝtmarko	**2,50**
Unuataga koverto kun bildo de katedralo kaj kongresa poŝtmarko	**2,50**
Poŝtkarto kun akvoputo, kongresa poŝtmarko kaj unuataga stampo	**1,60**
Poŝtkarto kun katedralo, kongresa poŝtmarko kaj unuataga stampo	**1,60**
Luksa folio kun kongresaj filatelaĵoj	**7,50**

Sendokostoj: Por ĉiuj tri kovertoj, kartoj aŭ luksaj folioj aldonu po 0,90 gld. Por registrita ekspedo aldonu plian sumon de 3,60 gld.

Minimuma mendo, ekskluzive de la sendokostoj, estas 10,00 guldenoj.

Antaŭpagu kaj mendu ĉe: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto 627337. Se vi pagas per banko, aldonu 6,00 guldenojn por bankaj kostoj.

RIMARKO: La supraj prezoj estas pli altaj ol tiuj anoncitaj al la kongresanoj, ĉar la belga poŝto neatendite altigis la valoron de la kongresa poŝtmarko.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Waringhien 1887 kaj la sekvo... Eseoj IV

Tio estas la sola volumo de la eseoj de prof. Gaston Waringhien nun aĉetebla en la movada libromerkato. La unuaj tri volumoj de la ĉefa eseisto en la historio de la Esperanta literaturo jam delonge elĉerpiĝis ("Eseoj I", "Lingvo kaj vivo", "Ni kaj ĝi"). Mendu do:

1887 kaj la sekvo. . .; Eseoj IV, de Gaston Waringhien (1901 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1980. 300p. 21cm. ISBN 90 6336 013 4. Prezo: 33,00 gld.

STAFETO

Eldonejo TK/Stafeto
Miksebaan 65A
B-2130 Brasschaat
Belgio

Tiun nomon vi renkontas ĉie...

KLM Boeing 747 survoje.
Al Usono, Aŭstralio, la Malproksima Oriento; al unu el la 120 urboj en 75 landoj. Multaj homoj senhezite mendas lokon ĉe KLM.

Kompreneble, ĉar inspiras fidon gasti ĉe via aviada kompanio. Vi povas esti certa ke vi flugas en moderna aviadilo. Perfekte kontrolata kaj direktata de personaro kiu estas 100%-e preparita por sia tasko. Agrabla penso. Dum la vojaĝo vi povas fidi je la KLM-servado kaj la kabina stabo estas je via dispono.

Ĉe KLM vi simple estas hejme. Kien ajn vi flugas. Kie ajn vi estas, tra tuta mondo ja troviĝas pli ol 300 oficejoj.

Jes, tiun nomon vi renkontas ĉie.

KLM